

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361


4

1996

中國報導

EL POPOLA

ĈINIO





Nutrado

Foto de JIN YAOWEN

INTER NI

Ni aprobas la opinion de legantoj, ke plibonigi nian revuon estas nia ĉiutaga tasko. La pliboniĝo de EPĈ dependas de klopodoj de la redaktoroj, ankaŭ de rimarkigoj de legantoj. En tiu ĉi rubriko ni iam aperigis sugestojn de legantoj pri temo, stilo kaj lingvaĵo. Iliaj rimarkigoj rilatas al diversaj flankoj, kaj sube estas iliaj novaj opinioj pri la kovrilo, fotoj kaj paĝo-aranĝo:

Iuj ne tre ŝatas la kovrilojn de 1995, al ili plaĉas la malnovaj kovriloj kun pli granda bildo. Aliaj havas saman opinion, tamen laŭdas aperigon de la vortoj "En Esperanto" sur la kovrilo.

Iuj ne ŝatas la fotojn pri infanoj kun ludilo pafilo nek tiujn pri kokobatalo, kiuj pikis la legantojn. Aliaj plendis, ke la nigrablankaj fotoj estas malhelaj

kaj malmultiĝas koloraj bildoj.

Rilate al paĝo-aranĝo, iuj malaprobas daŭrigon de teksto post pluraj paĝoj kaj proponas, ke ni donu gloson, se necesas.

Iuj legantoj petas aperigi nomojn ne nur de aŭtoroj, sed ankaŭ de tradukintoj, por ke oni povu distingi inter originalo kaj tradukaĵo. Aliaj interesiĝas pri la sekso kaj profesio de aŭtoroj.

Venis ankaŭ opinioj pri plibonigo de la rubriko "Korespondi Deziras" kaj propono pri gluo de poŝtmarkoj sur la koverto kun sendota revuo.

Ni bonvenigas kaj alte taksas tiujn sugestojn kaj laŭeble kontentigos la petojn de niaj legantoj. Ni kore dankas ilin.

La Red.

ENHAVO

2 *INTERNI*

4 Nova politiko pri naskolimigo de Ĉinio

6 *ORIGINALE VERKITAJ:*

Ŝajna vojo; Songô; Vizio (Prozaĵoj)

8 *POR KOMENCANTOJ:*

Steloj

9 *ĈINAJ E-ISTOJ:*

Fidela e-isto Jiang Zuyue

12 Intervjuo kun Mark Fettes, ĝenerala sekretario de UEA

14 *ESP-NOVAĴOJ*

15 *EKONOMIE:*

Ĉinio malaltigis import-tarifojn je 30%

16 Serĉado de metempsikoziĝinto de Banĉen Erdini la 10-a

18 Kuracejoj tra Tibeto

20 Infanoj en lernado de pekina opero

24 *MIA VIVO:*

Mi laboras kiel liftistino

25 *NUNTEMPA BELARTO:*

Skulptistino Zhang Dedi

28 *LAŬ LA SILKA VOJO:*

Budhismaj historioj ĉe la Silka Vojo

35 *MULTNACIA ĈINIO:*

En malriĉa loko de Gansu

37 Impresoj pri suda Henan-provinco

39 Fabela loko Guilin

41 Tetrinkejoj en Hangzhou

42 Ŝanhajo, urbo de la Unua Azia Kongreso de Esperanto

44 Grimpado sur Wuling-monton

45 Kial ili longe vivas?

46 *KURANTAJ AFEROJ*

48 *POR VIA SANO:*

Masaĝo en la ĉiutaga vivo (X)

49 Humuro de Afanti

50 *GALERIO:*

Kantado kun piedbato

SUR LA KOVRILO:

Knabineto kaj floroj

Foto de **Gao Mingyi**


2 Nutrado

SUR LA DORSKOVRILO:

Tianchi-lago en Xinjiang

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Guilin (p. 39)
2. Ŝanhajo (p. 42)
3. Hangzhou (p. 41)
4. Linxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Subprovinco (p. 35)
5. Lhasa (p. 16)
6. Henan-provinco (p. 37)



Nova politiko pri naskolimigo de Ĉinio

LAŭ takso de la Fonduso por Loĝantara Aktivado de UN, la nombro de la totala loĝantaro de la mondo atingos 6 miliardojn en 1999, 7 miliardojn en 2010, 8 miliardojn en 2022. Rapidege kreskas la loĝantara nombro, do kiom da loĝantoj la tero povas enteni? Faktoj montras, ke la homaron minacas multaj problemoj, inter kiuj pli seriozas multiĝo de loĝantaro, nesufiĉeco de riĉfontoj kaj poluado de medio. La loĝantara problemoj estas atentata de la tuta mondo. De 1993 ĝis 1995 en Nov-Delĥio, Kairo kaj Kopenhago okazis kunvenoj respektive pri loĝantaro, loĝantaro kaj evoluo, kaj socia evoluo. En la kunvenoj ĉefoj kaj sciencistoj de diversaj landoj alvokis por la estonteco de la homaro: Limigu la nombron de loĝantaro, savu la terglobon.

La totala nombro de la ĉina loĝantaro (escepte de la loĝantoj en Taiwan-provinco kaj la regionoj Hongkong kaj Aomen) atingis 1.214 miliardojn ĉe la jarfino de 1995, kiuj konsistigas pli ol 1/5 de la totala loĝantaro de la mondo. Tamen la pokapa areo de agroj kaj la pokapa areo de sensala akvo estas nur 1/4 de tiuj de la mondo. La gren-produktokvanto de Ĉinio okupas la unuan lokon en la mondo, tamen la pokapa kvanto estas malpli ol 400 kg. Ĉiujare kvantono de la nacia enspezo estas konsumita de la plimultigita parto de la loĝantaro, tio malhelpis la evoluon de ekonomio. Tro rapida kresko de loĝantaro alportas problemojn pri enoficiĝo, edukado, loĝado, trafiko kaj kuracado. Por ke kreskado de loĝantaro kunordiĝu kun la evoluo de ekonomio, utiligo de riĉfontoj kaj protektado de medio, por ke ni kaj niaj posteuloj feliĉe vivu, Ĉinio devas kaj evoluigi ekonomion kaj praktiki naskolimigon. Tio estas penado de la ĉina registaro por la feliĉo de la ĉina popolo kaj stabileco de la monda loĝantaro.

La nuna politiko pri naskolimigo de Ĉinio estas: proponi malfruan geedziĝon kaj malfruan naskon, akcenti eŭgenikon, proponi al ĉiu geedza paro naski nur unu infanon. Eventuale geedzoj en la kamparo povas havi duan infanon plurajn jarojn post la naskiĝo de la unua. Konkretaj paŝoj en la regionoj de nacimalplimulto estas difinitaj de ilia provinco aŭ

aŭtonoma regiono. Pro la diferencoj de ekonomia disvolviĝo, stato de loĝantaro kaj praktikado de naskolimigo inter diversaj regionoj, la lokaj politikoj pri naskolimigo estas nesamaj.

La naskolimigo de Ĉinio efikas post ĝia klopodado en la pasintaj pli ol 20 jaroj. Menciindas, ke kvankam post 1991 kulminis la nombro de naskipovaj virinoj, tamen estis bremsita la tendenco de tro rapida kresko de loĝantaro. La naskokvanto mal-kreskis de 3.343% en 1970 al 1.121% en 1994. En 1970 la ĉinaj virinoj naskis meznombre po 5.81 infanojn dum la tuta vivo, kaj en 1994 po ĉ. 2. Pasis 25 jaroj post 1970, kaj laŭ la naskokvanto tiama, nun Ĉinio devus havi 1.514 miliardojn da loĝantoj, sed ne 1.214.

Dum la praktikado en la pasintaj pli ol 20 jaroj oni spertiĝis kaj trovis vojon por solvi la loĝantaran problemon de Ĉinio: fari ĝeneralan konsideron pri loĝantaro kaj socia disvolviĝo; meti naskolimigon en la ĝeneralan projekton de la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo; vaste, profunde kaj konstante propagandi naskolimigon al la tuta popolo; kaj ligi naskolimigon kun interesoj de la kamparanoj kaj disvolviĝo de la kampara ekonomio.

Oktobre de 1995 okazis en Sichuan-provinco en sudokcidenta Ĉinio kunsido por interŝanĝi spertojn pri naskolimigo. S-ino Li Meixiang (Li Mejŝjang), kiu venis de kamparo de nordorienta provinco Jilin (Ĝjilin), prezentis sian personan sperton: "Edziniĝinte, mi naskis filinon kaj la familio dronis en ŝuldoj, sed mia edzo deziris filon. En 1983, laŭkontrakte mi kulturis 1.3 hektarojn da rizkampoj kaj funkciigis prilaborejon de greno kaj poste porkobredejon. En tiu jaro mi enspezis 8 000 juanojn. Mi ne nur malŝuldiĝis, sed eĉ aĉetis ŝargaŭton por transportado kaj per tio enspezis 10 000 juanojn en nur 10 monatoj. Mia edzo ĝojas pro tio kaj ne plu deziras filon. Nun ni pli energie entreprenas la laboron."

La familio de Li Meixiang donis ekzemplon al la aliaj. Ekde 1990 ŝi prizorgas naskolimigon de la vilaĝo. Ŝi propagandas la politikon de naskolimigo kaj diskonigas eŭgenikon kaj sciojn pri kontraŭkon-

cipo, disdonas preventilojn kaj samtempe helpas riĉigi la familiojn, kiuj renkontas malfacilojn en naskolimigo. Li Meixiang diris: “En nia vilaĝo s-ino Qu Fenglu (Ĉju Fenglu) havas maljunan patrinojn kaj 6-jaran filinon. Ŝi loĝas kun siaj bogepatroj, kaj pro malsano la bopatro ŝuldis 2 000 juanojn. Ŝia familio malmulte enspezis. En 1994 mi helpis ŝin kolekti monon por aĉeti ŝafojn. Mia edzo per nia ŝarĝaŭto veturigis ilin senpage. La bonrasaj ŝafoj kreskis rapide kaj donis dikan tavolon da lano. En tiu jaro ŝi reprenis la produktokoston kaj en 1995 ŝi enspezis 7 000 juanojn. Ŝi aĉetis bovon kaj ĉaron.”

Li Meixiang daŭrigis: “En nordorienta Ĉinio la kamparanoj nenion faris en frosta vintro. Mi proponis, ke miaj samvilaĝanoj senŝeligu juglandojn, kaj preskaŭ ĉiuj 200 familioj partoprenis en la laboro. En 1994 nia vilaĝo prilaboris 250 mil kilogramojn da juglandoj kaj ĉiu familio enspezis meznombro 2 500 juanojn. La pokapa jara enspezo superis 1 500 juanojn. Kaj ŝanĝiĝis ankaŭ la koncepto pri geedziĝo kaj infan-nasko de iuj vilaĝanoj, kiuj antaŭe petis min permesi al ili naski plian infanon, sed nun ili diris al mi, kial ili ne volas naski plian infanon. En nia vilaĝo oni esperas malmulte naski, sed rapide riĉiĝi.”


Similaĵoj okazis en diversaj lokoj de Ĉinio. En Wangcang-vilaĝo de Sichuan-provinco multas loĝan-

toj, sed mankas agroj. La malnova popoldiro “pli da infanoj, pli da feliĉo” profunde influis la kamparanojn. Iuj malriĉaj familioj vivantaj el ŝtata subvencio deziris pli da infanoj, aliaj dronis denove en malriĉeco pro tro da infanoj. Antaŭe oni kritikis aŭ monpulis la familiojn, kiuj malobservis la regulojn pri naskolimigo, sed tia puno vekis ilian malkontenton. De 1987 Wangcang-gubernio ligis naskolimigon kun helpo al malriĉaj familioj, tia rimedo estis aprobita de la kamparanoj, kiuj volonte sekvis la politikon pri naskolimigo kaj pli multe enspezis, helpate de loka naskolimiga organizo. En 1994 la pokapa enspezo de Wangcang estis 2.7-oble pli multa ol tiu en 1985.

Ĉinio estas agrikultura lando, kies kamparanoj konsistigas 80% de la totala loĝantaro. Nun 70 milionoj da kamparanoj ne havas sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj. Ili deziras adiaŭi malriĉecon, sed mankas al ili mono, tekniko kaj informoj. La naskolimiga organizo ellaboris programojn, kiuj kombinas naskolimigon kun riĉigo de virinoj kaj sanitara servo al virinoj kaj infanoj. Nun la popolanoj kontentas pri la politiko pri naskolimigo.

En la venontaj 15 jaroj Ĉinio celos limigi la nombron de sia loĝantaro je 1.3 miliardoj antaŭ 2000 kaj je 1.4 miliardoj antaŭ 2010. La nunaj rimedoj kaj politiko donas al ni esperon. ■

Naskolimiga propagando al kamparaj virinoj



PROZAĴOJ

de NEVENKA TOMIĆ (Macedonio)



La aŭtoro

Ŝajna vojo

Varmega antaŭvespero. Dum la sunsubiro la okcidento disŝetis siajn signojn. Mi klopodis trankviliĝi. Vane, mi atendis lin. Du brilaj okuloj alvenis, kvazaŭ ili estus sunradioj. Li ridetis.

La okcidentaj signoj malaperis, mallumiĝis. Li diris: “Ni interŝanĝu la okulojn.” Ni kolombumis en mallumo atendante la lunarkon, sed ni nur vidis la brillan nordan stelon en nigrablua malproksimeco.

Hejme, surloke surprizita, mi vidis: sur mia lito sidis la homo NIGROVESTITA, nigra ĉapelo, nigraj okuloj... “Mi atendis vin, mi estas via gvidanto,” li diris. Mi timis. Eble li estas malica, eble li kaŝas sian nigran animon... ho, se mi povus rifuĝi...

“Pripensu ĝis morgaŭ,” li diris kaj malaperis tra fermita pordo. Mia nokto senfina, multe da inkuboj... Matene, dormema mi memoris: kiam mi estis infano, mi sopiris al malproksimeco, al nekonato... kaj tiumomente mi aŭdis la voĉojn... sekvante la spurojn de tiuj voĉoj, mi dronis en la stelaro... Kion fari? Ĉiu paŝo riska, la balasto pezas, la enigmo de racio min premas. Tiam mi aŭdis: “Oni povas ekoni la homojn per trapasita stela vojo, la animojn oni mezuras per la stela mezurilo.” Mi nenion komprenis. Ludo de vortoj, la signoj de oriento, ludo de bildoj, ludo de formoj. Mi komencis desegni, iu

kondukis mian manon kontraŭ mia volo. Linioj, rondoj, radietoj trembrilantaj... dummomente mi konsciis praajn mesaĝojn. Mia NIGROVESTITA gvidanto flustris al mi, la kosmoŝipa formo aperis sub mia desegno, eksonis la kosma simfonio. Ornamoj, signoj sur la muro de mia ĉambro... mi eliris... eniris... bruoj inundis, ekbolis mia ena varmo, la norda stelo ekbrilis. Mi aŭdis la voĉon de NIGROVESTITA: “Ne timu, vi estas poeto, vi serĉas la vojon.” Neatendite, alia sekreta voĉo min kaptis, la homo BLANKVESTITA ridetis: “Konfidu ĉion al mi, mi estas via gvidanto.” Mi svarmjukadis, dilemis. Kondukita mano desegnis la blankan ŜLOSILON. Miraklo! La pordo apertis, mi eniris, la ŝipo ekflugis, mi ĝojis senpeza. Blua spaco senfina... senfina... mia vojo al destino, mi ekpensis kaj per la okuloj mi brakumis la kosmon. Ĉiuflanke mildaj melodioj, mallaŭta voĉo flustris: “Vidu, vi venis en malproksimecon, vi estas infano, vi estas senpeka.” Mi ridetis etendante la manojn, ho la vasta ĉielo... kaj tiumomente la blanka ŝlosilo elfalis en bluan senfinon. Restis nur la blanka muro de mia ĉambro, la ridaĉo de BLANKVESTITA malproksimiĝis...

Sonĝo

Eble pasis la noktomezo. Soifa, mi iris en la kuirejon preni glason da akvo. Per duonfermitaj

okuloj mi revenis en la dormoĉambron, survoje, per la piedfingroj mi frapis seĝon. Pro la doloro mi tute vekigis. Al diablo! Denove mi iris en la kuirejon preni kukojn. La televidprogramo ĉesis, mi funkciigis la radion. Ho, Dio mia, kion fari, se mi ne povus denove ekdormi!

La muziko promesis bonan nokton. Mi finmanĝis la kukojn. Vana paniko, mi trankviliĝis, verŝajne mi ekdormos baldaŭ. La frumateno estis malagrable, doloris min la kapo, mi frostiĝis. La ĉambro lumiĝis, mi decidis prepari kafon kaj tuj poste mi intencis viziti miajn nepojn.

Sed, antaŭ ellitiĝo mi kutimis deĉifri miajn sonĝojn. Mi sonĝis strangan kaj rektan sonĝon: Dumsonĝe mi estis soifa kaj mi iris preni akvon. Revenante, mi frapiĝis kaj la glaso falis, ĉie estis la vitropecetoj. Tiom!

Mirinda, mi tuj vestiĝis kaj iris en la kuirejon. Mi konsterniĝis! Meze de la koridoro multe da vitropecetoj! Panike mi kuris en la banejon kaj haltis antaŭ la spegulo. Ve, mi havis vundon sur la frunto! Malvarma ŝvito rampis sur mia korpo, la koro freneze batis. Mi timis foriri, apenaŭ mi spiradis, mi komencis plori. Al kiu telefoni? Kio okazis ĉi tiun nokton? Eble mi estis malsana, mi min demandis. Mi estis certa, ke mi nur sonĝis kaj mi restos certa por ĉiam! Ĉu konfidi al iu persono, ne, neniu kredos al mi... Tamen mi konfidis ĉion al iu amiko. Li tute simple diris al mi: "Mi vidas nenion teruran en via sonĝo, ĉio eblas... hm... hm... scienco..."

Vizio

Somero, junio. Io malfunkciis, mi estis suspektema. Li venis sen antaŭe telefoni. Ne gravas, estas bone ke li venis, eĉ tiel mi ne intencis promeni tiun vesperon. Mi diris: "Ĉu vi scias kio estas nova, mia fil..." "Vidu, ni povas esti nur amikoj," li diris. Mi trankvile diris: "Nova virino, ĉu ne?" "Ne demandu, vi estas saĝa virino, mi scias." Li tuj poste eliris, al mi restis sidi ŝtoniĝinta. Subite la planko kaj la seĝo komencis sin movi, mi kriis kaj falis. La larmoj kvazaŭ torento inundis miajn manikojn. La tutan vesperon mi ploris. Poste, neatendite mi trankviliĝis, mi lavis mian vizaĝon kaj prenis la spegulon: "Dio mia, eble mi malbeliĝis, ĉu mi estas maljuna... Io ajn, mi vane amis, tiela fino... nur kvin vortoj post kvin jaroj." La torento de larmoj denove kaj denove elfontas, la kapo min doloras, centfoje mi tramarŝis la ĉambron. Mi kriis, blasfemis kaj... la nekontrolita rido min kaptis. La tristeco de la ĉambro ne ĉesas. La telefono... mi silentas... denove la telefono...

Diabla scivolemo tentas min. "Mi devas al vi redoni viajn librojn," li nur diris. "Bone, venu ĉi tien." Li ne venis. Mi kelkan tempon nenien iris.

Jam venis aŭgusto. Mi elektas la malĉefajn stratojn, li ankaŭ, ni promenas, mi sola. Mi ĉiam sentas ke li pasas ie proksime. La rememoroj fontas dum mi marŝas... al diablo li kaj lia amo...

Tra la ĉefa strato mi marŝis nur antaŭtagmeze, li tiam laboris. La vendejoj estis plenaj de diverskoloraj vestaĵoj. Mi aĉetis kelkajn kaj la speguloj ridetis al mi. Mi konstatis ke mi estas ankoraŭ bela kaj juna. "Via talio plaĉas al mi. Via svelta talio... via hararo bela," li kutimis ofte diri. Mi decidis ŝanĝi la harkoloron... ne mi ŝanĝos la frizaĵon... Mi aĉetis multe da vestaĵo kaj mi decidis ekvojaĝi. Liaj fenestroj ne estis lumigitaj jam dek tagojn, li eble ankaŭ ekvojaĝis... al diablo li kaj liaj fenestroj... Mi preparis min kaj ĝuste kiam mi eliris aĉeti la bileton, mi rimarkis lin kune kun ŝi. Ŝia frizaĵo samkiel la mia, sed ŝi estis pli dika, ankaŭ pli juna, ŝajnas, ne multe. Tiumomente li rimarkis min kaj haltis. Ni manpremis, ŝi ankaŭ, ŝi afable ridetis. Mi ridetis kaj rapide elpensis: "Pardonu, mia amiko atendas min ĉe tiu angulo, mi rapidas." La koro batis, tiu koro perfidulo, sed mia vizaĝo eltenis, la okuloj ankaŭ. Mi estis fiera.

Do, tiu estas ŝi, ha, ha, mi freneze ridis... sed, la larmoj sen mia volo fontis. Mi estis furioza, kial mi haltis, stultulino, sed, ne gravas... Ĉu li iomete retenis mian manon... ŝajnas. Ne gravas, li por mi estas pasinto, li estas mortinto... malbenita estu li kaj...

Mi malamamis lin, mi decidis ekvojaĝi, sekvatage mi ekveturis viziti mian fratino.

Venis la aŭtuno, ankoraŭ estas varme, mi promenas ĉiutage. Kelkaj viroj apud mi ridetas, rigardas min... la viroj... kie li troviĝas mi resignoprete pensas. Iun tagon mi decidis iri en kinejon. Antaŭ la kinejo du larmoj en miaj okuloj ekbrulis. Granda doloro, sola en la kinejon, ho, Dio, kial mi estas tiel malfeliĉa. Mi revenas plorante, la piedoj pezas, ĉirkaŭ mi mallumo. Neatendite iu tuŝetas mian ŝultron: "Virino, ne estu tiel trista, vi venkos." Mi ŝtoniĝis. Lia vizaĝo lumigita ŝajnis, la okuloj verdaj, stranga vestaĵo, kvazaŭ mezepoka. Milda vizaĝo, varma rigardo, mi svarmjukadis. Li tuj malaperis, mia koro batis, mi timis. Mi kuris, kuris hejmen. Tiu homo spitmokas, ve, Dio mia, eble mi frenezigiĝis, hejmen, mi estas malsana, mi halucinas... jes, mi halucinas, helpu al mi Dio, savu min. Mia strato, mi kaŝas la vizaĝon kaj tuj dronas en la kuseno. La ĉambro silentas, terura ploro eĝiĝas. Tiel plu oni ne povas, mi devas uzi medikamentojn... mi estas malsana... mi mortos...

La telefono, mi ne ellitiĝas, denove la telefono... denove... al diablo ĉiuj... mi dilemas, eble estas mia filino.

"Jes, kiu... vi... kion vi dez..."

"Demandu pri nenio, mi ne povas vivi sen vi, mi tuj venos..."

Steloj

(Udmurta fabelo)

ANTAŬ tre longe en la mondo vivis knabino. Ŝi havis ok jarojn, kiam ŝiaj patro kaj patrino mortis. Ekmankis tiuj, kiuj prizorgus ŝin: manĝigus, belvestus, dirus karesan vorton. Ŝi havis nenion krom la ĉifona robaĉo kaj plenĉifona kaptuko. Ŝi estis devigita vagadi tra la mondo kaj almozpeti.

Iun tagon iu bona homo donis al ŝi pecon da pano. Tuj post kiam ŝi eliris malantaŭ la pordegon (ekster la korton), maljuna almozulo iris renkonte al ŝi.

— Donu iom da pano, mi

ege volas manĝi!

La knabino fordonis al li la pecon.

— Manĝu, — ŝi diris, — avĉjo, por la sano.

Kaj ŝi iris pluen. Ŝi iradis, kaj jam vespero venis. Ŝi renkontis junan fraŭlon.

— Fordonu al mi la kaptukon, — li petis. — Mi kovros la kapon, ĉar fariĝis malvarme.

La knabino demetis la kaptukon kaj fordonis ĝin al la

fraŭlo.

Tuj post kiam ŝi foriris, steloj subite komencis fali el la ĉielo kaj transformiĝi en argentejn monerojn. La knabino ekĝojis kaj ekkolektis ilin.

Ne vane oni diras, ke bona afero — ĉu frue, ĉu malfrue — ĉiam estas repagata per la samo. ■

Eludmurtigis
Bronislav Ĉupin (Rusio)



Anonco

De la 2-a ĝis la 7-a de septembro 1996 okazos en la Scienca Urbo, kvartalo Zhongguancun, Pekino, la Kvina Internacia Akademio Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto aŭspiciata de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Temo: La 21-a jarcento — nova periodo de scienca kaj teknika evoluo. Enhavo kaj tagordo: Antaŭtagmeze de la 3-a de sept. estos inaŭguro kaj posttagmeze prelegoj; je la 4-a kaj la 5-a de sept. diskutado en grupoj, je la 6-a de sept. vizito kaj ekskurso (duontaga, unutaga); kaj antaŭtagmeze de la 7-a de sept. fermo. Krome, la Sciencista-Teknikista E-Asocio ĉe la Ĉina Akademio de Sciencoj okazigos en Pekino de la 15-a ĝis la 21-a de julio 1996 la '96 Internacian Esperantan Someran Semajnon por Geknaboj kaj Gejunuloj kaj Simpozion pri Kompilado de Esperantaj Lernolibroj kaj Didaktiko por Geknaboj kaj Gejunuloj. Pri detaloj bonvolu konsulti la Sciencista-Teknikistan E-Asocion ĉe la Ĉina Akademio de Sciencoj. Adr.: 52 Sanlihe, Pekino 100864, Ĉinio. Fax: 0086-10-859 1095

FIDELA E-ISTO JIANG ZUYUE

de WANG HANPING



ESPERANTO estas grava parto en la vivo de nemalmultaj homoj, inter kiuj troviĝas s-ro Jiang Zuyue (Ĝjang Zujüe). Kvankam li aĝas pli ol 70 jarojn, tamen li ankoraŭ aktivis en Esperantujo.

Jiang Zuyue naskiĝis en intelektula familio de Changsha, ĉefurbo de Hunan-provinco. En la 40-aj jaroj li studis mineralogion kaj metalurgion en Hunan-universitato. Pro malriĉeco de la familio li ĉesis studi kaj eklaboris en kompanio funkciigata de usonano en Wuhan, urbo de najbara provinco. Poste li loĝis en Hongkong. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 li revenis al Hunan por konstrui sian hejmlokon. En 1952 li eklaboris en la Changsha-a Metalurgia Projekta Instituto. En 1957 li estis politike atakata kaj devis forlasi sian fakon. Dum la sekvantaj 20 jaroj li multe suferis. Kiam li revenis al la instituto post la "kultura revolucio", li okupiĝis pri informa servo.

En la 50-aj jaroj, kiam li sin trovis en la malfavora politika situacio, li estis forte altirita de la bela idealo de Zamenhof kaj eklernis Esperanton. Sed pro la malbonaj kondiĉoj li ne povis multe fari por la movado.

Jiang Zuyue tre aktivis en la movado en la 80-aj jaroj, tiam revigliĝis la Hunan-a E-Asocio, kiu dormis multajn jarojn. Li fariĝis membro de ĝia konsilantaro kaj respondecis pri edukado. Li fondis E-kurson kaj sin okupis pri multaj aferoj: publikigi anoncon, serĉi klasĉambron, doni lecionon, korekti ekzercojn de la lernantoj. Mankis lernolibro, do li pruntis ĝin de aliaj kaj disdonis al la kursanoj ĝiajn kopiojn mimeografitajn.

Tiam en Ĉinio funkciis multaj korespondaj kursoj de Esperanto. Jiang Zuyue do volonte helpis la kursanojn en Hunan. Li kopiis nomliston de tiuj kursanoj kaj donis la kopiojn al lokaj E-aktivuloj, por ke ili lernu kaj kunsidu en grupo. Helpe de s-ro Jiang, fondiĝis E-organizoj en multaj lokoj de

Hunan-provinco.

Baldaŭ multiĝis esperantistoj en Changsha kaj aliaj lokoj de Hunan. En 1986 fondiĝis la Changsha-a Esperanto-Asocio, kun Jiang Zuyue kiel vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario. Oni eldonis "Organon de Changsha-a E-Asocio" kaj starigis provincan E-studrondon. La Changsha-a E-movado iris en sian prosperan periodon.


Post sia emeritiĝo en 1989 Jiang havas pli multe da tempo por okupiĝi pri Esperanto. Li estis invitita de la Guangdong-a E-Asocio por helpi la organizadon de E-movado en Kantono, ĉefurbo de Guangdong-provinco. Li fondis Informo-servon "Verda Spiko" ĉe la stacidomo de Kantono. Lia loĝejo fariĝis "Esperanto-domo", kiu akceptis multajn ĉinajn kaj alilandajn esperantistojn, inkluzive de prof. So Gilsu, eksestrarano de UEA. Li instruis Esperanton en altlernejoj de Kantono ĝis 1992, kiam li revenis al Changsha.

Jiang havas feliĉan familion: ankaŭ lia edzino emeritiĝis, iliaj filo kaj filino jam havas sian propran familion. Ilia 13-jara nepo loĝas ĉe ili, do la avo devas prizorgi la nepon.

Ĉiutage Jiang aŭskultas E-elsendon kaj legas E-eldonaĵon. Li korespondas kun multaj samideanoj enlandaj kaj eksterlandaj. Li ofte gastigas esperantistojn en sia hejmo. Antaŭ nelonge li propagandis Esperanton surstrate.

Pro diversaj kialoj malmultiĝis esperantistoj en Changsha en la lastaj jaroj. Jiang ĉagreniĝis pri tio, tamen li, fidela al la idealo, ne cedis al la malfaciloj kaj decidis dediĉi sian tutan vivon al E-movado.

Nun Jiang kompilas E-vortaron kaj E-lernolibron. Li kolektis multajn Esperantajn eldonaĵojn, filatelaĵojn, insignojn kaj fotojn, kiujn li ofte ekspoziciis. Li deziras fondi E-bibliotekon por heredigi tiujn kolektaĵojn. ■




S-ano Jiang Zuyue kun sia nepo en zoo

S-ano Jiang Zuyue (staranta) en kunveno por la centjara jubileo de Esperanto





S-ano Jiang Zuyue kaj lia malnova amiko Zeng Hojaŭ (dekstre) en Chongqing en 1995



S-ano Jiang Zuyue (dekstre) kaj aŭstraliaj ges-anoj Leereveld (la tria kaj dua de dekstre) en Kantono en 1991

S-ano Jiang Zuyue (meze de la malantaŭa vico) kaj membroj de la Hunan-a E-kurso en 1985



Intervjuo kun Mark Fettes, ĝenerala sekretario de UEA

ANTAŬVESPERE de la fermo de la 80-a UK en Tampere mi kaj s-ino Wang Yuqin (Ŭang Juĉin), parolisto de la Esperanta Sekcio de la Ĉina Radio Internacia, intervjuis s-ron Mark Fettes, ĝeneralan sekretario de UEA. Nia juna ĝenerala sekretario ĝoje akceptis nin en sia hotelo kaj respondis kun afableco niajn demandojn.

Wang Yuqin: En la 80-a UK naskiĝis nova estraro de UEA kaj vi restas ĝenerala sekretario. Ĉu vi volus paroli pri la nova estraro, ĝiaj membroj kaj estonta laboro?

M. Fettes: Bone, dum la 80-a UK en Tampere elektiĝis nova estraro de UEA. Ĝi estas 7-persona kiel la malnova. El tiuj 7 personoj nur 2 restas en la nova: mi kaj s-ino Mechela Lipari. La aliaj 5 estraranoj estas novaj. Tio kompreneble signifas, ke ni devas multe interparoli pri niaj faroj, niaj tradiciaj ideoj, ĉar tiam, kiam oni havas novan teamon de homoj, ili alportas freŝajn ideojn, novan energion, novajn kapablojn, kaj la estraro devas organizi sin por pli bone uzi tiujn novajn ideojn kaj novajn kapablojn. Sed mi povas diri jam nun, ke kvankam dum la kongreso ni povis kunsidi nur mallonge, tamen tre rapide ni trovis komunajn ideojn pri la fareda agado. Ŝajnas al mi, ke estas 3 ĉefaj direktoj por nia agado kadre de UEA. Kaj ili estis fakte jam antaŭ kelkaj jaroj menciitaj en la ankoraŭ aktuala tradicia faro de UEA, kiu restas nia ĉefa gvidilo tra la jaroj. Tiuj 3 punktoj estas disvastigo de Esperanto, utiligo de Esperanto kaj ekstera agado aŭ foje oni nomas tion edukado al tutmonda konscio. Do, kion oni komprenas sur tiuj 3 aferoj. Disvastigo de

Esperanto estas agado de la landaj asocioj, de la homoj, kiuj aktivis por informi la publikon pri Esperanto, kiuj tenas kontaktojn kun ekz. amaskomunikiloj, kun ĵurnaloj, kun radio- kaj televido-elsendoj. Tio estas ankaŭ la kampo de niaj instruistoj, kiuj efektive kreas novajn esperantistojn kaj kondukas ilin en la movadon. En nia estraro 2 homoj respondos pri tiu kampo, pri disvastigo de Esperanto. Ili estas s-ino Rene Triolle, nia vicprezidanto el Francio kaj s-ro Povilas Jegorovas el Litovio.

La dua granda kampo — utiligo de Esperanto — denove havas 2 homojn por si. Utiligo de Esperanto estas uzado de Esperanto kaj praktikaj aferoj, kiuj donas al ni plezuron uzi, pliperfektigi kaj efikigi la lingvon, ekz., la kongresoj kaj servoj de UEA. Tio estas ankaŭ agado de fakaj asocioj, ne nur tre profesia agado de sciencistoj aŭ de komercistoj, sed ankaŭ hobia agado, kiu donas plezuron kaj vivocelon al homo kaj homoj. La 2 estraranoj, kiuj okupiĝos pri tiu kampo estas s-ino Mechela Lipari el Italio kaj s-ro Amri Wandel el Israelo.

Lasta grava afero estas ekstera agado, pri kiu laboras mi kaj prof. Lee Chong-Yeong, nia nova prezidanto el Koreio. UEA tenas kontaktojn kun UN, Unesko, Konsilio de Eŭropo, kun Organizo de Amerikaj Ŝtatoj kaj kun diversaj aliaj gravaj internaciaj organizoj. Kaj ni povos ankaŭ havi pli da kontaktoj kun sciencaj kaj kulturaj organizoj kaj kun gravaj homoj en la monda fluo de informoj kaj monda politika bazo ktp.

Nu, vi eble kalkulis, ke mi jam menciis 6 homojn kaj restas unu alia, kiu estas d-ro Fred de Grus el Nederlando kaj lia kampo estos nur la

financo, kiu estas kompreneble la bazo de ĉiu nia agado kaj estas grave, ke ni havas estraranon tre kompetentan, kiu tre bone konas la financon de UEA kaj kiu sendube daŭrigos la fruktodonajn klopodojn plifortigi la financobazon de UEA, fari saĝan prudentopolitikon, kiu certigos, ke la asocio povos ne nur daŭre ekzisti, ekzistadi, sed ankaŭ fari pli kaj pli da aferoj per sia mono.

Wang Lihua: Vi estas la plej juna en la estraro de UEA kaj tio vekis mian grandan scivolemon. Ĉu vi volus paroli iom pri vi mem, pri via Esperanta kariero, pri via vivo kaj pri via familio?

M. Fettes: Mi estas novzelandano. Nun mi loĝas en Kanado. Miaj edzino kaj filo estas kanadanoj, do, ankaŭ mi estas kanadano. Mi naskiĝis en Usono en 1961. Miaj gepatroj tamen ne estas usonanoj, ili estas angloj. Kaj ili migris unue al Kanado kaj poste al Usono. Kaj ankaŭ en Usono naskiĝis miaj 2 fratinoj. Kiam mi havis 10 jarojn, nia tuta familio elmigris denove al Novzelando per granda marŝipo.

Mia unua inspiro lerni Esperanton venis de mia onklo. Li estis konata kiel multjara organizanto de la infana kongreseto. Dank' al li mi renkontiĝis iomete kun tiu lingvo en la aĝo de 5 jaroj.

En la aĝo de 19 jaroj mi forlasis Novzelandon kaj iris al Britio por studi en universitato. Alveninte en la universitaton de Kembriĝo en Britio, mi trovis malgrandan, sed tre viglan E-grupon de studentoj kaj aliĝis al ĝi kaj komencis partopreni en la kunvenoj kaj tiam mi efektive ekpraktikis Esperanton en 1980. Kutime, kiam oni demandas min, kiam mi eklernis Esperanton kaj kiam mi esperantistiĝis, mi diras, ke en tiu jaro, ĉar antaŭ tio mi konis la lingvon nur el libroj.

Sed ankaŭ tiam mi ne tre rapide eniris en la movadon. Mi vizitis kelkajn junularajn kunvenojn. En la somero de 1981, mia unua somero en Eŭropo, mi iris al Pollando kun amikoj kaj pasigis tie 2 semajnojn, parolante kun polaj studentoj kaj instruistoj. Estis tre interesa la vizito kaj tio konvinkis min pri la rolo de Esperanto, sed verdire, dum mia universitata periodo mi ne multe

uzis la lingvon. Sed poste mi iris de Kembrigo al Vankuvero, granda urbo ĉe okcidenta marbordo de Kanado. Tio okazis en 1983, kaj tiam mi sciis, ke en la sekvanta jaro okazos la 69-a UK en Vankuvero. Ĝuste en tiu universitato mi estis studento. Tio estis unu el la motivoj iri tien kune kun aliaj. Kaj do, loĝante sur la tereno de la kongreso, mi eniris en la lokan kongresan komitaton kiel kongresejestro. En tiu 2-semajna periodo mi tre tre intense uzis Esperanton, organizante multajn surlokajn aranĝojn. Tio enkondukis min profunde en la movadon. Kaj post tio, mi komencis mendi librojn, revuojn, kaj legi kaj skribi. Kaj mia vera movadaneco naskiĝis de tiu kongreso.

Nur 2 jarojn post tio, mi forlasis miajn studojn, ĉar ili ne plu tiom interesis min, kaj mi volis ion interesan kaj mi skribis al UEA kaj demandis, ĉu oni povus preni min por iu laboro. Kaj mi longe atendis. Finfine mi ricevis la respondon, kiu diris: Jes. Ni bezonas novan oficiston. En la fino pli kaj malpli de oktobro de 1986, 2 monatojn post la 71-a UK en Pekino, mi venis en la Centran Oficejon de UEA, kaj oni tuj demandis, ĉu mi pretas fariĝi redaktoro de la revuo "Esperanto". Kaj mi akceptis tiun laboron, kiu daŭris preskaŭ 5 jarojn ĝis la komenco de 1992. Mi forlasis la Centran Oficejon en aprilo de 1992 kaj poste en la kongreso en Vieno oni elektis min kiel estraron de UEA. Mia nova okupo en la estraro estis pri informado kaj eksteraj rilatoj.

Wang Lihua: Kial vi dediĉas viaŭn belegan junecon al E-movado?

M. Fettes: Ĉar la E-movado mem estas bela. Kaj mi opinias, ke plej bone en la vivo estas okupiĝi pri belaj aferoj.

Wang Lihua: Krom Esperanto, kio plej plaĉas al vi?

M. Fettes: Mi tre ŝatas naturon, mi ŝatas promeni en arbaro, en montaro. Mi kreskis kun montaro. Mia patro estas tre entuziasma montogrimpanto kaj arbaropromenanto. Do, mi kreskis kun tio kaj tio estas parto de mia personeco. Mi tre ŝatas literaturon, mi amas poezion kaj romanojn. Kelkfoje mi ŝatas verki romanon eventuale, sed intertempe, ĉar mi ne havas tempon por tio.

Wang Lihua: Ĉu vi volus paroli iom pri nia revuo EPĈ, pri ĝiaj artikoloj, je la nomo de ĝenerala sekretario de UEA?

M. Fettes: Pri EPĈ mi multe admiras la manieron, en kiu ĝi sukcesas teni tiel altan nivelon malgraŭ la ekonomiaj ŝanĝoj en Ĉinio, la fakto, ke nun vi devas mem prizorgi vian propran financon bazon. Tio vere estas malfacila ŝanĝo por iu ajn revuo. Kaj mi estas certa, ke multaj okcidentaj esperantistoj, kiuj laŭ la teorio devus scii la manierojn vivi kaj turniĝi al kapitalisma socio, tamen ne sukcesis tiom bone adaptiĝi tiel, kiel faris la teamo de EPĈ. Do mi elkore deziras, ke tiu revuo restu ankoraŭ multajn jarojn unu el la ĉefaj, plej famaj revuoj de Esperantujo kaj ankaŭ kompreneble iĝu ĉiam pli bona.

Mi ĉiam trovis diversajn interesajn artikolojn en ĝi. Kompreneble, en revuo tiom dika pri tiom diversaj temoj ne ĉio estas same interesa por ĉiu persono kaj ankaŭ mi trovis iujn artikolojn ne tiel interesaj kaj aliajn ege interesaj, speciale multaj artikoloj pri Esperanto, pri kulturo, pri E-movadoj, intervjuoj kun diversaj esperantistoj, artikoloj de alilandaj esperantistoj donis vere interesan legadon, kaj tio estas vere unika kultura kontribuo al Esperanto.

Wang Yuqin: Kiel vi scias, nun ekzistas lingvoproblemo. Vi estas britdevena kaj denaske parolas angle. Ĉu vi ne pensas, ke por Esperanto la angla lingvo estas plej granda baro?

M. Fettes: Nu, la granda baro ne estas precize la angla lingvo, sed la

kredo de la angla lingvo. Multaj homoj blinde fidis, ke la angla lingvo solvas aŭ povos solvi estonte ĉiujn komunikajn problemojn, do en tio kuŝas la problemo, sed la problemo ne estas la angla lingvo mem, kiu estas la plej uzebla en la mondo, do oni uzas ĝin. Mi opinias, ke simple kontraŭi la anglan ne havas multe da senco por esperantistoj. Sed tio, kio havas sencon, estas montri la mankojn de tiu solvo, ke ĝi funkcias, sed funkcias koste de grandaj penoj por multaj homoj, speciale por neeŭropanoj, kiuj devas lerni ne nur la lingvon malfacilan, sed ankaŭ tre malsimilan.

Wang Lihua: Kiel ĝenerala sekretario de UEA kaj neaziano, ĉu vi volus iom paroli pri la Unua Azia Kongreso de Esperanto?

M. Fettes: Fakte mi ricevis nur hodiaŭ la broŝuron. Mi povus diri nur, ke la evoluo de la azia agado dum la lastaj jaroj estis vere unu el la plej pozitivaj kaj esperigaj flankoj de la agado de UEA. Kaj nun pli kaj pli da aziaj landoj kunlaboras kaj aziaj esperantistoj helpas unu alian kaj organizas ĝuste siajn proprajn kunvenojn, ekz., komuna junulara renkontiĝo inter almenaŭ 3 aziaj landoj. Kaj ŝajnas al mi, ke la Unua Azia Kongreso de Esperanto, kiu okazos venontjare en Ŝanhajo, estas simple tia paŝo en tiu evoluo, kaj tio estas tre salutinda. Aparte se oni memoras, ke en Azio loĝas duono de la homaro, do tie estas duono de nia estonteco, kaj pro tio mi estas tre ĝoja pro la venontjara kongreso.

S-ro Mark Fettes (meze), la aŭtoro (dekstre) kaj s-ino Wang Yuqin



● La 9-an kaj la 10-an de decembro 1995 okazis en Dongfeng-gubernio, Jilin-provinco, simpozio pri disvolviĝo de Esperanto en la suda parto de Jilin-provinco. Ĝia temo estas "Lukrado, disvolvo kaj E-movado." Ĝin ĉeestis pli ol 40 esperantistoj.

(Liu Minghui)

● Septembre kaj oktobre de 1995, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis poŝtmarkoseriojn "La 4-a Monda Virina Kongreso de UN", "Internacia Pm. kaj Monera Foiro", "La Granda Muro", "Pejzaĝoj en Monto Jiuhoa", "La 100-jara Jubileo de la Naskiĝo de Kino" kaj "La 50-jara Jubileo de la Fondiĝo de UN". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisijaj tagoj memoriĝajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj).

● Filio de Pola E-Asocio en Koszalin organizas la 18-an Renkontiĝon de Esperantistoj kaj Naturamantoj en la tagoj 9-15 de junio 1996 en la ĉarmega kaj gastama Mielno, nomata Perlo de polaj ĉemarbordaj ripozejoj.

● De la 11-a ĝis la 17-a de aŭgusto 1996 okazos en Danio Esperanto-semajno pri Martinus Kosmologio. En tiu semajno la tuta instruado pri la kosmologio de Martinus okazos en Esperanto, la internacia lingvo de Martinus-Instituto.

(Poul Dyrholm)

● Inter la 2-a kaj la 9-a de septembro 1995, Malta E-Societo okazigis la 5-an Internacian Turisman Semajnon. 16 geesperantistoj el Francio, Germanio, Italio, Portugalio kaj Svislando partoprenis la aranĝon. Okazis diversaj ekskursoj al interesaj kaj vidindaj lokoj.

(Silvan Muglietti)

Partoprenantoj de la 5-a Internacia Turisma Semajno



● Per nekutima maniero varbis la Esperanto-Laborkomitato Aŭstria por la internacia lingvo: la 18-an de junio 1995 ili luprenis malnovan tram-motorvagonon, muntis ŝildojn "Esperanto!" ambaŭflanke kaj veturis dum tri horoj tra la aŭstria ĉefurbo Vieno. La tramo konstruiĝis en 1928, de-

ĵoris ĝis antaŭ 10 jaroj kaj detale renoviĝis de privata tram-fan-klubo. La tuta varbagado kostis 1 500 nederlandajn guldenojn por la 25 geesperantistoj.

(Valter Klag)

● Librovendejo Esperanto de Barcelono, Hispanio, festis en la pasinta septembro sian 17-an datrevenon. En la festo estis prezentata la lasta verko de Giordano Moya "Survoje al Universala Civilizacio", lasta volumo de lia trilogio. La aŭtoro informis la ĉeestantojn pri la ĉefaj ĉapitroj de la libro kaj la estonta graveco de la Esperanto-Movado rilate la intrnaciajn kontaktojn favore al Universala Civilizacio.

(S. Aragaj)

Antaŭ la librovendejo Esperanto en Barcelono



● La 14-an kaj la 15-an de oktobro 1995 okazis renkontiĝo de jugoslavaj esperantistoj en Prohorovo apud la urbo Vranje. Estis granda nombro de partoprenantoj. La plenkunveno de jugoslavaj esperantistoj faris la 14-an de oktobro unuaniman decidon pri fondo de Esperanto-Akademio Esprohorovo. Por direktoro de la akademio estas nomumita Boriša Milicevic, prezidanto de JEL.

(D. Bogdanovic)

● La 7-an de oktobro 1995 la tutmonda Ago-Tago por Esperanto celebriĝis kiel kutime ankaŭ en Toulouse, Francio. Matene sur la ĉefa placo "Capitole" esperantistoj disdonis flugfoliojn por informi pri Esperanto. Posttagmeze sur la sama placo, antaŭ la urbodomo, ligna tabulo kun du tabloj kovritaj de libroj kaj broŝuroj informis la publikon pri nia lingvo kiel solvo de la lingvo-komunika problemo. Ili diskutis kun interesuloj kaj faris enketojn.

(Esperanto-Kultur-Centro)

● Fondaĵo unu Homaro unu Planedo (FuHuP) naskiĝis dank' al Unuiĝo Togolanda por Esperanto. Ligi internacian konscion pri Esperanto kaj strebdon al paco kun praktikaj taskoj en landoj estas ĝia celo. Por kunlaborado bv. skribi al: FuHuP, Afantchao-Biakou Yao, BP 20225 Lome, Togolando.

(FuHuP)

● En la 27-10-95 okazis en la urbo Venado Tuerto, Argentino, la 16-a Festivalo de la Kanzono en Esperanto. Partoprenis 8 gekantistoj.

(M. S. Solis)

Ĉinio malaltigis import-tarifojn je 30 %

de LI ZHENGPING

EN la Azi-Pacifika Ekonomia Konferenco en Osako, fine de 1995, Jiang Zemin (Ĝjang Zemin), prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, promesis malaltigi ĝeneralan nivelon de import-tarifoj minimume je 30% ekde 1996, por akceli la proceson de libera komercado kaj investado en la regiono. Tio vekis grandan atenton de la mondo.

La ĉi-foja dogan-malaltigo koncernas pli ol 4 000 dogan-erojn. En Ĉinio estas sume ĉ. 6 000 dogan-eroj. Samtempe kun tio, Ĉinio nuligis importajn kontingento-licencojn kaj importajn kontrol-rimedojn pri pli ol 170 importotaj varoj, kiuj konsistigas pli ol 30% de la varoj administrataj de la nunaj importaj kontingento-licencoj de Ĉinio.

La decido de la ĉina registaro markis gravan salton en liberkomercado post 1979, kiam komenciĝis la reformado kun la celo turni la planizitan ekonomion en la socialisman merkatan. Ni retrorigardu, kiel la ĉina registaro penadis en reformado de la eksterakomerca sistemo kaj malaltigo de doganoj ekde 1986, en kiu ĝi oficiale petis restarigi la fondinto-pozicion de Ĉinio en la Ĝenerala Interkonsento pri Tarifo kaj Komercado.

— En 1991 ĝi nuligis eksportajn subvenciojn;

— Januare de 1992 ĝi siaflanke malaltigis doganojn al 225 importaj varoj kaj ĉiujn importajn reguligajn impostojn;

— Decembre de 1992 ĝi malaltigis doganojn al 3 771 importaj varoj kaj sekve de tio la ĝenerala nivelo de la ĉina dogano malleviĝis je 7.3%;

— Decembre de 1993 ĝi malaltigis import-tarifojn de 2 898 dogan-eroj;

— Ekde januaro de 1994 ĝi malaltigis dogan-tarifojn por 234 varoj, inkl. de insekticido, gravaj materialoj koncernaj al la ĉina industria kaj agrikultura produktado kaj pecoj de mekanikaj kaj elektraj produktoj, kaj ekpraktikis provizorajn import-tarifojn.

Ĉio ĉi atestas, ke Ĉinio ne praktikas protektismon, la ĉina merkato malfermiĝas al la mondo paŝo post paŝo kaj Ĉinio decideme kaj persiste antaŭenpuŝas la regionan ekonomian kunlaboron por efektiviĝi liberan komercadon kaj investadon. Laŭ la nuna stato, la averaĝa dogan-tarifo de la evoluintaj landoj estas 4.7%, tiu de la evoluantaj landoj kaj

regionoj — ĉ. 13% kaj tiu de Ĉinio en 1995 — ĉ. 22%. Post malaltigo de dogan-tarifo je 30%, la ĉina dogan-tarifo egalas al tiu de plejparto da evoluantaj landoj. Tio ne nur havas gravan signifon por integriĝo de monda ekonomio, sed ankaŭ profunde influas la ĉinan ekonomian disvolviĝon.

Unue, malaltigo de dogano utilas al nova eksporta sistemo konforma al la internacia komerca kriterio. En 1991-1995 la totala importa sumo de Ĉinio atingis 400 miliardojn da usonaj dolaroj. Tial, malaltigo de dogano en granda proporcio kaj reduktado de kontingento-licencoj kaj importaj kontrol-rimedo ne celas limigi importadon, sed iom post iom anstataŭigi nedoganajn rimedojn per la doganoj, por ke tiuj fariĝu unu el la ĉefaj rimedoj por reguligi importan kaj eksportan komercadon, akceli la disvolviĝon, ke en importa administrado oni prenu doganon kaj valutan kurzon kiel la ĉefajn ekonomiajn rimedojn kaj aliajn necesajn administrajn rimedojn kiel la helpajn, por fine garantii ekvilibran disvolviĝon de importa kaj eksporta komercado.

Due, malaltigo de dogano utilas al la reformado de la ŝtataj, precipe la eksterakomercaj entreprenoj de Ĉinio. Dum longa tempo la ĉina ekonomio iris kaj disvolviĝis sub duobla protektado, nome, la importa kvanto-limigo kaj dogana limigo de la ŝtato. Sin apogante sur tiu protektismo, la entreprenoj ĉiam kontentigis pri la estanta stato, kio malhelpis konkurencojn inter la entreprenoj kaj ekonomian kreskon. Dogana malaltigo neeviteble alportas intensan konkurencon. La antaŭa protektismo ne plu ekzistas. Valuta kurzo, tarifo, frajt-asekuro kaj eĉ varprezo kaj administraj kondiĉoj ĉiuj estas publikaj kaj egalaj ĉu por la ĉinaj entreprenoj ĉu por la eksterlandaj. Tio postulas, ke la ĉinaj entreprenoj adiaŭu la antaŭan dependecon kaj havu konkurencon koncepton. Nur tiel ili povas ekzisti kaj disvolviĝi en la konkurencoj.

Trie, malaltigo de dogano utilas al enkonduko de eksterlandaj teknikoj kaj ekipaĵoj. Tio povas ŝparigi grandan elspezon por ekspluato kaj esplorado de teknikoj, gajni tempon por akceli la ekonomian disvolviĝon kaj kiel eble plej rapide malgrandigi la teknikan diferencan inter Ĉinio kaj la evoluintaj landoj. Kreado kaj ekspluatado per enkondukitaj teknikoj povas ne nur rapidigi teknikan reformadon de entreprenoj, akceli altgradigon kaj renovigon de produktoj kaj fortigi internacian konkurencon povon de produktoj per multvaloraj produktoj, sed ankaŭ ŝanĝi la tradician prez-konkurencon inter la entreprenoj en konkurencon kun kvalito kiel la centro, evitigi konkuran prez-altigon kaj kuran malprofiton de la ŝtato.

Kompreneble, malaltigo de dogano en granda skalo neeviteble atakos iujn entreprenojn de Ĉinio, iuj el ili eĉ povas esti elkribitaj. Tamen, konsidere la longtempajn interesojn de la ŝtato, tio estas nepre paŝo por Ĉinio. ■



Gyaincain Norbu

LA 29-a de novembro 1995 estis tago bonaŭgura laŭ la tibeta kalendaro. Ĉe la mateniĝo Dazhao-templo, kie regis iluminado kaj ŝvebis incensfumo, dronis en plena trankvileco kaj soleneco. Tie estis okazonta la ceremonio por konfirmi la knabon kiel la metempsi-koziĝinton de Banĉen Erdini la 10-a per tiro de loto el ora urno.

En sutrorecitado Cering-lamao, direktoro de la Demokratia Administra Komitato de la templo Zhaxil-hunbo, abatejo de Banĉen Erdini, pie metis tri eburajn slipojn volvitajn per flava silko en oran urnon, skuis la urnon kelke da fojoj kaj lokis ĝin antaŭ la statuo de Ŝakjamunio. Kiam ĉesis sutrorecitado, ekregis silento en la tuta halo. Bomi Qambalozhub, estro de la tibeta branĉo de la Ĉina Budhista Asocio, kun plena absorbiteco ekrecitis sutron, turnis la slipojn kaj tiris loton el la ora urno. Li transdonis ĝin al la prezidanto de la ceremonio kaj tiu ĉi laŭte anoncis: "Gyaincain Norbu el Lhari-gubernio estas elektita kiel la metempsi-koziĝinto de Banĉen Erdini la 10-a!" Je tio tra la tuta halo ekhurais monaĥoj kaj centoj da partoprenantoj kaj aŭdeblis ankaŭ preĝado. Antaŭ la statuo de Ŝakjamunio Bomi Qambalozhub tonsuris la elektitan infanon

YI XIU:

Serĉado de metempsi-koziĝinto de Banĉen Erdini la 10-a

kaj donis al li la budhisman nomon Jizun Losang Qamba. Posttagmeze de la sama tago la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko aprobis lin kiel Banĉen Erdini la 11-an.

RELIGIAJ GVIDANTOJ DE TIBETO

Banĉen kaj Dalai estas religiaj gvidantoj de Tibeto, kaj ankaŭ ĝiaj plej altrangaj vivaj budhoj. Ili apartenas al la flava sekto de la tibeta budhismo, kies kreinto estis Congkapa. Li havis ok disĉiplojn, la dua disĉiplo, t.e. Khedrupgyi estis Banĉen Erdini la 1-a kaj la lasta, t.e. Gendun Drupa estis Dalai-lamao la 1-a.

Komence ne estis la titoloj Banĉen kaj Dalai. En 1653 imperiestro Shunzhi de Qing-dinastio (1644-1911) honoris Losang Jiaco per la titolo Dalai-lamao la 5-a kaj en 1713 imperiestro Kangxi de Qing-dinastio honoris Losang Yixi per la titolo Banĉen Erdini la 5-a. Poste, la reenkarniĝintoj de Banĉen kaj Dalai senescepte ricevis la titolojn respektive kaj la titoloj de Dalai 1-4-aj kaj Banĉen 1-4-aj estis donitaj poste.

En Tibeto Banĉen Erdini kaj Dalai-lamao estas egalaj politike kaj religie. Historie, iam inter ili ekzistis rilato de majstro kaj disĉiplo. Ni prenu Banĉen

Erdini la 5-an Losang Yigshe kiel ekzemplon. Li estis majstro ne nur de Dalai-lamao la 6-a sed ankaŭ de Dalai-lamao la 7-a. Sed Dalai-lamao posedas pli multe da temploj, monaĥoj kaj bienoj ol Banĉen Erdini.

MISTERA METEMPSIKOZA SISTEMO

La heredo de la titolo de Banĉen kaj Dalai estas konfirmita laŭ la metempsikoza sistemo. Unue, aŭguri. Foje antaŭ sia morto Banĉen kaj Dalai testamentis aŭ sugestis, kiam kaj kie lia animo reenkarniĝos. Sen testamento kaj sugesto oni devis fari aŭguron kaj rigardi reflekon ĉe la lago Lamolacuio por peti helpon de la dio. Post la morto de Dalai-lamao la 13-a sur la lago aperis tri tibetlingvaj literoj. La viva budho Rezhen, la tiama regento de Tibeto, klarigis: "La unua litero signifas Amdon. Tio montras, ke lia reenkarniĝo okazos en la regiono Amdo." Poste naskiĝis en la regiono Dalai-lamao la 14-a. Kiam oni serĉis la reenkarniĝon de Banĉen Erdini la 9-a, sur la lago prezentigis, ke tigro dormas sur la ŝtuparo antaŭ la templo Zhaxilhunbo. Kaj Banĉen Erdini la 10-a naskiĝis ja en 1938, la jaro de tigro. Due, serĉi la metempsikoziĝinton. Surbaze de la aŭgura teksto kaj fadeno el rigardado de la lago, oni serĉas diversloke la metempsikoziĝinton en ekstreme granda sekreto. Pro malsamaj komprenoj pri aŭspicioj kaj aŭgura teksto ofte okazas malakordoj inter la serĉantoj. Iam estas trovitaj unu aŭ du kandidatoj, iam tri aŭ kvar, aŭ eĉ pli. Trie, rekoni objektojn. Oni kunmetas te-servicojn, vestojn, mes-objektojn k.a., kiujn plej ŝatis Banĉen aŭ Dalai antaŭ sia morto, kaj objektojn similajn al ili, por ke la kandidatoj-infanoj rekonu ilin. Kiu misrekonas, estas eliminata. Kvare, kiam la kandidatoj estis difinitaj, oni devas peti dion Dharmapala respondi, kiu el ili estas la metempsikoziĝinto. Se la respondo kongruas kun la ĝusta rekono, do la kandidato farinta la ĝustan rekonon estas konfirmita kiel la nova Banĉen aŭ Dalai. Kaj kvine, tiri loton el ora urno. La urno 34 cm alta konserviĝas en Dazhao-templo. Se estas du aŭ pluraj kandidatoj, oni devas skribi iliajn nomojn en la lingvoj manĉura, hana kaj tibeta sur eburaj slipoj respektive kaj meti ilin en la oran urnon. Recitinte sutrojn, iu lamao tiras el ĝi loton. Kies nomo legiĝas sur la slipo, tiu estas la nova Banĉen aŭ Dalai. Post aprobo de la centra registaro oni determinas bonaŭguran tagon kaj okazigas la surtroniĝan ceremonion por li sub la prezido de la reprezentanto de la centra registaro. Jen finiĝas konfirmado de la nova Banĉen aŭ Dalai.

SERĈADO DE LA REENKARNIĜINTO

Post nirvano de Banĉen Erdini la 10-a, de decembro 1990 ĝis julio 1993, okazis preĝado en grandaj temploj de Tibeto, Qinghai, Gansu, Sichuan kaj Yunnan.

Junie de 1989, en bonaŭgura tago la grupo por serĉi kaj konfirmi la metempsikoziĝinton de Banĉen Erdini la 10-a, kiu konsistis el viva budho Gyaya, sutra instruisto de Banĉen Erdini la 10-a, kaj eminentaj bonzoj de la tibeta lamaismo, pilgrimis Dazhao-

templon kaj tie kultis la statuon de Ŝakjamunio. Post tio ili venis al Yongzalucuo en Rinbung-gubernio de Xigaze kaj la dia lago Lamolacuio en Gyaca-gubernio de la regiono Shannan por rigardi reflekon sur la lago. Surbaze de la dufoja rigardado de la lago kaj sugesto de la forpasinta Banĉen Erdini la 10-a kun la vizaĝo en direkto al la nordo estis konfirmita, ke la nova Banĉen naskiĝis oriente aŭ nordoriente de Xigaze en la jaro de serpento, ĉevalo aŭ ŝafo.

La 24-an de februaro 1992 la grupo por serĉi kaj konfirmi la metempsikoziĝinton de Banĉen Erdini la 10-a sendis tri sekretajn grupetojn el eminentaj bonzoj kaj vivaj budhoj al Tibeto, Qinghai, Gansu, Sichuan kaj Yunnan. Ili trovis pli ol 20 knabetojn en 46 gubernioj. Poste, ili faris pliajn du-tri sekretajn serĉojn. Laŭ la direkto montrita en rigardado de la lago, simbolo de la naskiĝ-jaro de infano, ecoj de naskiĝloko kaj rezulto de la serĉado, precipe diversaj bonaŭguroj, kaj post ripetfoja analizo estis elektitaj el ili tri plej bonaŭguraj knabetoj.

BANĈEN ERDINI LA 10-A METEMPSIKOZIĜIS EN ORDINARA FAMILIO

la 6-jara Gyaincain Norbu naskiĝis en Lhari-gubernio de la regiono Nagqu, Tibeto. Tie sterniĝas vasta stepo kun lagoj kaj arbaroj. La tiea pejzaĝo similas al tiu prezentita en rigardado de la lago. Li naskiĝis la 13-an de februaro 1990, la jaro de serpento. La patro Soinam Chagba kaj la patrino Sanggyai Zhoima naskiĝis en familioj de ordinaraj paŝtistoj en norda Tibeto. La 26-jara Soinam Chagba iam paŝtis kaj servis kiel skribisto kaj nun estas respondeculo de la traduka sekcio de la gubernio. La 32-jara Sanggyai Zhoima laboras en librejo de la gubernio. Ili interkonatiĝis en 1986, kiam ili lernis en la sama kleriga kurso. Unu jaron poste, ili geedziĝis kaj komencis vivi feliĉan vivon.

La ĵus naskiĝinta Gyaincain Norbu havis blankan kaj delikatan haŭton, brilajn okulojn kaj grandajn orelojn, kiujn oni rigardas bonaŭguraj. La maljunuloj, kiuj vidis lin, diris, ke eble li estas metempsikozito de la forpasinta Banĉen Erdini. En la sekvantaj monatoj bela birdeto de tempo al tempo flugis super la domo de lia familio kaj loĝis sur ĝia tegmento.

Iutage de novembro de la jaro oni kunportis Gyaincain Norbu eksterdomen por distriĝo. Instruisto de gubernia lernejo hazarde rimarkis, ke la vejnoj sur lia lango ege similas al tibetlingva litero, kiu simbolas enkarniĝon de budho.

La novaĵo cirkulis de loko al loko. Lin vizitis ankaŭ membroj de la grupo por serĉi kaj konfirmi la metempsikoziĝinton de Banĉen Erdini la 10-a. Analizinte la reflekon sur la lago, bonaŭguron, favorajn aŭspiciojn de la korpo de Gyaincain Norbu kaj pejzaĝon de lia hejmloko, ili konkludis, ke li estas unu el la plej taŭgaj kandidatoj por la metempsikoziĝinto de Banĉen Erdini la 10-a. Li fine fariĝis Banĉen Erdini la 11-a post la ceremonio por konfirmo per lotado kaj sankcio de la centra registaro de Ĉinio. ■

Antaŭ la Liberiĝo sur la areo de 1 228 400 kvadrataj kilometroj de Tibeto estis nur 3 tibet-medicinaj kuracejoj, funkciigataj de la loka registaro, kaj malmultaj privataj kliniko, kie laboris malpli ol 100 homoj. Sub tiaj malbonaj kondiĉoj la tibetaj malsanuloj povis nur preĝi al Budho por resaniĝo.

Post kiam Tibeto estis pace liberigita en 1951, la centra popola registaro multe helpis Tibeton en disvolvo de la medicina afero kaj precipe en fonda de la medicina reto de la gubernia kaj distrikta niveloj. Dank' al longtempa penado fondiĝis kuracejoj tra Tibeto, kaj malaperis gravaj infektaj malsanoj.

Tibeto havas pli ol 900 distriktojn. Nun ĉiu distrikto havas sanitaran servon.

La tibeta medicino kaj tibetaj medicinaĵoj estas grava konsistiga parto de la tradicia ĉina medicino. En 1980 la ŝtato asignis grandan monsumon al fonda de la Tibet-medicina Hospitalo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, 5 subregionaj kaj 6 guberniaj hospitaloj, ĉiu kun kompletaj instalaĵoj. Tie oni ne nur kuracas per tradiciaj kurac-metodoj kaj ekipaĵoj, sed ankaŭ ekzamenas per iks-radia aparato, elektrokardiografo kaj aliaj modernaj okcident-medicinaj aparatoj. Kombinante la lokan medicinon kun la okcidenta, la tibetaj medicinistoj puŝas la lokan higienan aferon al nova etapo.

Qiangba Chilie, fama tibet-medicina fakulo, faras diagnozon por tibeta paciento.



Kuracejoj tra Tibeto

Fotoj de ZHOU YOUMA kaj DU ZEQUAN



Vakcinado



Medicinisto servas al paŝtistoj.

Ekzameno per iks-radia aparato



La Tibet-medicina Hospitalo de Lhasa



Infanoj en lernado de pekina opero

Teksto kaj fotoj de HUANG WEN

AMANTOJ de pekina opero loĝantaj proksime al Taoranting(Taŭjanting)-parko en la suda parto de Pekino havas la feliĉon ĝui pekinan operon sen viziti teatron. 10-jaraj lernantoj el la Mezlernejo Dependa de la Ĉina Teatra Instituto, en malstriktaĵoj kaj kun vizaĝo bunte desegnita, prezentas pekinan operon en la parko, akompanate de tamburado kaj gongado. Precipe la lernantoj de la klaso '95 profunde impresis la spektantojn: "Kial ili tiel bone prezentas, post malpli-ol-duonjara lernado?"

"Ĉiuj infanoj ege amas pekinan operon kaj jam ricevis specialan trejnadon antaŭ ol viziti la lernejon, kaj tiuj de la klaso '95 ĝuas apartan edukadon en la lernejo," diris s-ro Wu Chunsheng, estro de la lernejo. Tiuj 30 infanoj havas 21 instruistojn, kiuj plejparte estas fakuloj, profesoroj aŭ famaj aktoroj de pekina opero. Ili instruas al la infanoj la teorion pri pekina opero kaj ties ludarton. Por altigi sian nivelon ĉiuflanke, la infanoj devas lerni ne nur popularajn sciojn, sed ankaŭ muzikon, belarton kaj la anglan lingvon.

Ĉiutage la infanoj devas lerni ludi pekinan operon. La roloj de pekina opero estas dividitaj en kvin kategoriojn: *ŝeng, dan, ĝing, mo* kaj *ĉoŭ*. Laŭ sia voĉa destino la infanoj ekzercas sin per diversaj roloj en difinita kategorio. Iuj knabinoj speciale ludas la rolon de maljunulo, dum iuj knaboj — tiun de knabino aŭ maljunulino.

La infanoj tre ŝatas la kurson de pekina opero, ĉar ili aŭskultas la klarigon de instruisto kiel rakonton. Ili lernas en grupo laŭ roloj. La instruistoj estas severaj al ili en ĉiuj movoj kaj tonoj. Iuj el ĉi tiuj surgrimis benkon 3 m altan kaj desaltis de ĝi sentime. Metinte sortimenton da ŝlosiloj sur la levitan gambon de infanoj, la instruisto diris: "Firme staru! Ne lasu fali la ŝlosilojn! Sciu, kiam mi faris tion kiel lernanto, mia instruisto metis sur mian levitan gambon brikon pezan je 2.5 kg."

Ĉiuj roluloj senescepte devas bone ekzerci sin per melodio, monologo, movo kaj lukto. En la kurso de luktado instruisto, kun longa bastono en la mano, helpis al la infanoj salti transkapige. Kelkfoje iuj infanoj kaŭriĝis teren pro lacego. Je la momento la

instruisto kuraĝigis ilin: "Stariĝu, stariĝu!" Laŭ regulo, estas malpermesite al la lernantoj kaŭri, sidi aŭ sin apogi sur io dum trejnado.

Penega ekzercado nepras por la infanoj en ilia 7-jara lernado, ĉar ili, iliaj instruistoj kaj gepatroj havas la saman revon: reprosperigi pekinan operon.

La antaŭa formo de pekina opero estis Anhui-opero. 200 jarojn antaŭe, Anhui-opero venis en Pekinon. Asimilinte superecojn de alispecaj operoj, ĝi fariĝis pekina opero multe ŝatata de la tiamaj imperiestroj, iliaj edzinoj kaj kromedzinoj. Dank' al tio, la pekina opero senĉese disvolviĝis. Ĝi estas rigardata kiel la nacia opero de Ĉinio.

"Nun pekina opero depresias," diris lernanto Li Mo. Tiam estis tempo por tagmeza ripozo, sed li, en griza robo kun larĝaj manikoj, ekzercis sin antaŭ spegulo per movoj de pekina opero.

Vere, okcidenta kulturo altiris al si grandan nombron da junaj spektantoj kaj elstaraj aktoroj de pekina opero.

La ĉina registaro per diversaj rimedoj savas pekinan operon el la krizo de pereco kaj prudentuloj proponis, ke oni instruu pekinan operon al infanoj. Multaj el ili estas talentaj por pekina opero. Ekz., 10-jara Li Mo kaj lia kamarado Zhou Hong gajnis la unuan premion en konkurso de pekina opero. Li Mo diris, ke post diplomigo el la lernejo li daŭre lernos en teatra instituto.

Nemalmultaj el la infanoj devenis el familio de pekin-opera artisto. La avino de Jiachun (Ĝjaĉun) estas fama emerita aktorino de pekina opero. Ŝi diris: "Mi prezentis pekinan operon dum la tuta vivo, kaj mi estas tre maltrankvila vidi depresii pekinan operon." Ŝi instruis ĝin al sia nepo 3-jara. Kaj poste la maljunulino ŝparis sumon da mono kaj uzis ĝin kiel lernokotizon de sia nepo en la opera lernejo.

La infanoj heredis de siaj gepatroj ne nur elstaran ludarton, sed ankaŭ grandan sindonemon al pekina opero. La 9-jara knabino Xu Ying (Ŝju Jing), kiu eklernis de sia avo pekinan operon en la aĝo de 4 jaroj, ellitiĝis je la 6-a ĉiumatene por ekzerci siajn gambojn. Etendinte la gambon, ŝi levis la piedon ĝiskape kaj staris 40 minutojn en tiu teniĝo. La 10-jara Chang



Antaŭ prezentado

Liang ekzercis sin per transkapiĝo 400-foje ĉiumatene. Kiam li gajnis la unuan lokon de la nordĉinia grupo en tutlanda konkurso, li ridis kaj kantis en pekin-opera melodio: "Mia patro diris, ke li aĉetos al mi bongustajn manĝaĵojn, se mi sukcesos en prezentado."

Pekina opero estas rigardata kiel kvintesenco de la ĉina kulturo. La infanoj tion komprenis en la 15-taga vizito de Singapuro, kie ili faris prezentadon trifoje ĉiutage, kaj ĉiufoje la teatro estis plena de spektantoj, kiuj laŭdis: "Pekina opero havas sian eksterordinaran ĉarmon!" Ĝuste pro tio, iuj speciale vojaĝis per aviadilo por spekti la prezentadon de la infanoj. Aplaudate, la infanoj pensis: "La estro de la lernejo prave diris, ke pekina opero ne mortu kaj ĝi neniam mortos!"

Lastatempe la direktoro de la departemento pri aktivadoj de speciala eduko sub la japana Tsuge-universitato vizitis la lernejon. Li ne nur raviĝis de pekina opero, sed ankaŭ volis scii kiel la infanoj lernas la operon. Laŭ sia plano li gvidos 500 studentojn viziti la lernejon marte de 1997.

Tio multe kuraĝigis la infanojn al plua trejnado. "Kiel ajn mi dediĉos min al pekina opero dum la tuta vivo. Eĉ se ĝi ne plaĉus al la ĉinoj, mi prezentus ĝin por alilandanoj scivolemaj," diris Jiachun al sia avino, "venos la tago, en kiu mi ludos ĉefan rolon. Kvankam pekina opero interesas nun ne tre multajn homojn, tamen necesas ĝin prosperigi. Se ne, kion fari estonte, kiam mankos eminentaj aktoroj kaj multos interesatoj?"


Pli ol 20 trejnejoj jam ne sufiĉas por la infanoj. Pro tio oni prenis la manĝejon kiel trejnejon. Ĉiuvespere la infanoj sin ekzercas ĝis la 21-a kaj duono, kaj iliaj instruistoj devas bicikli hejmen post ilia enlitiĝo. Se iu el la infanoj malsanas, lia instruisto lin prizorgos ĉe la lito. Al la infanoj el diversaj lokoj de la lando la instruistoj estas severaj kaj afablaj, kiel iliaj patroj.


Kiam estiĝis malakordo inter infanoj, iliaj instruistoj

toj paciĝis ilin, dirante, ke oni povas bone prezenti pekinan operon, nur kiam oni bone unuigas. Post tio la infanoj paciĝis unu kun alia kaj vivis en harmonio.


Prezenti la operon por studentoj en universitato estas granda plezuro por la infanoj. Iuj el la studentoj venis al la lernejo por esti kromlernantoj. En ĝi lernas ankaŭ alilandanoj. La 16-jara usona knabino Anna sukcese prezentis pekinan operon en la kursofina ceremonio. Ŝiaj gepatroj, kiuj venis speciale por ĉeesti la ceremonion, tre ĝojis pro tio. 17-jara knabo el Japanio lernas ludi la rolon *ĉou*. Li diris, ke li dediĉos sin al reprosperigo de pekina opero post la diplomigo. ■

Sceno el la pekina opero





Post leciono



Li brakumas sian patrinon post unusemajna trejnado.



En paño de presentado

Trejnado



Mi laboras kiel liftistino

de ZHAO GUOPING

MI malvarmumiĝis. La nazo estis ŝtopita, la gorgo estis raŭka kaj mi sentis min malforta. Tamen mi ne restis en hejmo. De la 8-a ĝis la 17-a horo mi funkciigis lifton senripoze eĉ en tagmezo. Malgraŭ tio mi pasigis la tempon rapide, babilante kun la lifto-uzantoj. Informiĝinte pri mia malsaniĝo, onklino Yang, loĝanta en la 4-a etaĝo, donacis al mi bovlon da varma griaĵo. La de lernejo revenintaj infanoj intime salutis min "Onjo Zhao". Ĉio ĉi forpelis plejparton de mia laco.

Mi, 38-jara, laboris kiel liftistino 5 jarojn. Lifto-funkciigado estas ordinara okupo. En la lastaj jaroj leviĝis en Ĉinio grandnombraj domegoj, kiuj bezonas liftistojn. Tiel lifto-funkciigado fariĝis okupo, plejparte de virinoj.

Iuj opinias, ke la laboro de liftisto estas facila. Sufiĉas por li sidante premi la regbutonojn laŭ postulo de lifto-uzantoj. Fakto estas alia. En la 24-etaĝa domo, kie mi laboras, estas 168 familioj. Supoze en unu familio estas 3 anoj, en la domo loĝas minimume 500 homoj. Por ili servas nur 2 liftoj kaj 3 liftistinoj. Unu lifto funkcias, dum la alia estas rezerva. La 3 liftistinoj deĵoras alterne en 24 horoj ĉiutage. Se iu el ni malsaniĝis, la aliaj du deĵorantoj ofte ne povis bone manĝi en tagmezo aŭ sufiĉe dormi en nokto.

Foje en la pasinta somero, estis mia noktodeĵoro. En la 12-a horo de nokto, hipertensio subite atakis onklinon Wen loĝantan en la 12-a etaĝo, kiu ne povis reteni siajn fekon kaj urinon. Por kuraci ŝin en hospitalo, ŝia filo vekis min el profunda dormo en la deĵorejo kaj petis mian helpon. Spite al malpureco kaj malbonodoro de onklino Wen, mi kaj ŝia filo per lifto portis ŝin malsupren en ambulanco. Post kiam mi purigis la lifton kaj forlavis malpuraĵon de sur mia korpo, jam estis la 2-a horo de la sekvanta mateno. Kiel antaŭe mi ellitiĝis en la 5-a horo kaj akurate eklaboris je la 6-a horo. Tian okazaĵon spertis preskaŭ ĉiuj liftistoj.

Ni funkciigas lifton kaj samtempe gardas la domon por la loĝantoj. Iun posttagmezon komence

de tiu ĉi jaro, mi estis lifte portanta 20-jaran junulon al la 20-a etaĝo. Li diris al mi, ke li iros al la loĝejo n-ro 3 por dekoracio de ĉambroj. Tamen li ne povis eldiri nomon de la dommastro. Kun suspekto mi kune kun li frapis je la pordo de la loĝejo. Neniu estis ene. Mi refoje pridemandis la junulon. Tiam li konfuziĝis. Fakte li estas senlaborulo. Tiutage li, kunportante tenajlon, ŝraŭbturnilon kaj aliajn ilojn en sia sako, intencis ŝteladon. Sed ekster lia atendo li estis malkaŝita jam antaŭ la ŝtelado.

En la lifto konserviĝas aerpumpilo, valvomeĉoj de biciklo, kudriloj k.s. por doni oportunon al la loĝantoj.

Mi loĝas en okcidenta kvartalo de Pekino kaj laboras en suda kvartalo. Per biciklo mi iras al kaj revenas de la laboro. Ĉiutage la ir-kaj-revena vojo konsumas miajn du horojn. La bogepatroj loĝas kune kun ni. Mia bopatrino suferas de diabeto. Mia 14-jara filino vizitas malsuperan mezlernejon. En mia familio la mastrumado estas peza. Konsidere miajn malfacilojn, antaŭ nelonge oni transposteniĝis min al loĝdomo proksima al mia loĝejo. Sed pro longtempa kunestado, la amikiĝintaj loĝantoj ne volis mian foriron kaj ankaŭ mi ne volis forlasi ilin.

Tio estas interŝanĝo de sincereco. Mi fervore servas al ili, ili fidas al mi kaj zorgas pri mi. Kiam la gepatroj revenis hejmen malfrue, mi zorgis pri iliaj de lernejo revenintaj infanoj; kiam gasto venis, tamen la gastiganto ne estis en hejmo, mi poste transdiris al la gastiganto nomon kaj vizitcelon de la gasto. Se iu oficvojaĝis, li konfidis al mi la pagon por akvo-elektra konsumo. Ili ankaŭ petis min konservi ŝlosilojn por ili. Kiam mi estis tro okupita, ili memvole aĉetis legomon kaj flankmanĝaĵon por mi. Kiam mi malsaniĝis, pluraj familioj donis al mi medikamenton kaj manĝaĵon. Se hazarde mi ne deĵoris, eĉ infanoj ĉagreniĝis, ĉu mi estas malsana. Kvankam malgranda estas la lifto, tamen ĝi similas al granda familio, kie regas ĝojo kaj intimeco. Kiel mi povas forlasi tiun varman "familion"? ■

La aŭtoro (dekstre)



Skulptistino Zhang Dedi

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de YU YUNTIAN

ONI ne povas trovi eĉ iomete da melan-
kolio kaj plendo en la verkoj de skulp-
tistino Zhang Dedi. Ŝi estas tiel bon-
kora, ke, kvankam multe suferinta en
20 jaroj, tamen ŝi ne volas, ke la rigar-
dantoj dividu kun ŝi la suferojn. Ŝi diris, ke la ĉinoj
bezonas tenerecon.

En 1955 la 23-jara Zhang Dedi, fininte la kurson
de esplor-studentoj de la Centra Belarta Instituto,
fariĝis instruistino de la instituto, sed ŝi komencis
sian skulptistan vivon nur en sia mezaĝo. La kialo
kuŝis en tio, ke en 1957 pro politika kaŭzo ŝi devigite
faris kamplaborojn kaj pro tio perdis la rajton verki.
Ŝia edzo, kiu estis ŝia kunlernanto, prenis sur sin la
mastrumadon kaj flegis siajn du infanojn. Kiam ŝi
revenis hejmen el la kamparo, ŝia edzo neniel lasis
ŝin fari hejmlaboron. Li anstataŭigis 3-vattan lam-
pon per la 40-vatta kun la celo, ke ŝi faru skizon en
hela lumo. Tiutempe la filoj ĉiam petis sian patrinon
kanti kantojn unu post alia. “La infanoj estas ja
kompatindaj. Ili estas tre malofte karesitaj de la
patrina amo,” diris Zhang Dedi. Ĝuste pro tio, el-
irinte el la misfortuno, ŝi tuj ekhavis la ideon varmigi
la infanajn korojn per siaj verkoj.

Post nelonge naskiĝis ŝia verko “Flegado”. Ĝi
figuras flegistinon blovantan sur supon en kulero.
La skulptistino kortuŝis la spektantojn per la verko
plena de profunda humaneco.

Zhang Dedi persistas en esprimado de la plej
belaj kaj plej sinceraj sentoj de la homoj en siaj
verkoj: hontemo de kore-nacia knabineto ĉe debuta-
do; petolemo de la tibeta knabeto Dava; naiveco de
Dante ĉe la komenco de la amafero... Ŝi montras la
ĉarmecon de infanetoj ne nur per la trajtoj de la
vizaĝo, sed ankaŭ per ties korpopartoj. Ekz., la ver-
ko “Ludado de kordinstrumento” figuras la knabine-
ton, kiu pinĉas kordojn per la diketaj manetoj, kun
la piedoj unu sur la alia. Ĉi tiu statuo staras en iu
urbo de norda Ĉinio kaj montras, ke la infanoj devas
havi sian belan infanecon.

Skulpti la statuon de alte estimataj maljunaj ar-

tistoj estas urĝa tasko por Zhang Dedi. Post kiam
verkistino Ding Ling kaj kantistino Zhang Quan
(Ĝang Ĉjūan) forpasis, ŝi skulptis statuon por ili, ke
ilia spirito disradiu por eterne. Zhang Dedi aparte
atentas la personecon de skulptita figuro. Kiam ŝi
preparas sin por fari statuon al iu, ŝi dediĉas pli da
tempo por paroli kun li kaj legi liajn verkojn. La
penetremaj okuloj de la statuo de poeto Ai Qing
elspiras ian melankolion. Pri ĝi Ai Qing estis tre
kontenta kaj skribis: “En la verko estas ne nur mia
figuro, sed ankaŭ miaj spirado kaj korpotemperatu-
ro.”

Zhang Dedi faras senĉesan esploradon kaj ĉiam
esprimas specifan temon per konvena formo. La
verko “Ĝojo en Printempo” dediĉe al ŝia hejmloko
Chunyuān, Jinan (Ĝjīnan), Shandong-provincino, po-
vas esti rigardata kiel tridimensia papertondaĵo. La
ruĝamarmora skulptaĵo figuras leonon ludantan kun
globeto kaj ree prezentas la scenon, kiel la nordĉiniaj
kampanoj pasigas la Printempan Feston.


Post longa pripensado ŝi skulptis la statuaron
“Vojaĝo al najbaraj regnoj”. La verko konigas la
vojaĝon faritan de la fama antikva ĉina edukisto
Konfuceo kaj liaj disĉiploj en multaj regnoj. Ko-
mence mankis mono por la skulptado, tamen ŝi
diris: “Malgraŭ la malfacilo mi devas skulpti la
statuaron senprokraste.” Nun la grandioza bronza
Zhang Dedi kaj ŝia edzo



statuaro staras en la hejmloko de Konfuceo. Kaj kun granda emocio la posteuloj de Konfuceo diris al ŝi: "Nia prapatro ja estis kia en la verko!"

Per sia bronza reliefo "Oriente Bonvenigas", kiu temas pri la kultura interŝanĝo inter Oriento kaj Okcidento, ŝi gajnis la Premion de Prezidento de Italio. Tiel ŝi fariĝis la unua el la ĉinaj artistoj, kiu gajnis eŭropan skulpturan premion. Zhang Dedi per la tradicia ĉina skulpturo lerte faris la verkon kun la sceno: Dante kun sia amatino en nuboj iras al spektantoj kaj ĉirkaŭ ili orientaj anĝeloj muzikas kaj dancas. Pro la verko ŝi kaj ŝia edzo estis invititaj al Eŭropo. Kaj ili revenis al la patrolando, kunportante sian albumon pri eŭropaj skulptaĵoj.

Zhang Dedi venkis multajn malfacilojn neimageblajn por ordinaraj homoj. Kiam ŝi levis martelon por haki ŝtonojn kaj kiam ŝi surgrimpis 5-6-metran altaĵon por skulpti budhostatuon, ŝi montris ne nur saĝon sed ankaŭ eksterordinaran kuraĝon. Ŝiaj brakoj kaj manoj estis plenaj de vundoj, tamen tion ŝi ne atentis por daŭrigi skulptadon. Post ĉiufoja skulptado ripetigis ŝia kormalsano kaj la kapo terure doloris ŝin. Ŝia edzo profesoro Zhang Runkai (Ĝang Ĵunkaj) maltrankvile diris: "Se ŝi laboras sola, tio estas vere maltrankviliga por mi." Nun la geedzoj laboras en unu sama laborĉambro kaj kune kontribuas por la arto. ■



"Nov-Zelanda knabino" (Marmora skulptaĵo)





"Flegado" (Marmora skulptaĵo)



"Poeto Ai Qing" (Bronza skulptaĵo)



"Vojaĝo al najbaraj regnoj" (Bronza skulptaĵaro)

"Oriento bonvenigas" (Bronza reliefo)



POST la malfermiĝo de la Silka Vojo budhismo, kultata en Hindio kaj aliaj landoj en centra Azio, enkondukiĝis en Ĉinion laŭ tiu ĉi vojo. Post tio en Ĉinio aperis sennombraj temploj, pagodoj, budhaj statuoj, skulptaĵoj kaj freskoj. Vizitante budhismajn lokojn de Ĉinio, oni nature karmemoras la eminentajn bonzojn, kiuj penadis sur la vojo por enkonduki budhismon orienten.

FAMEN-TEMPLO KAJ BUDHISMA PROSPERIĜO

Laŭ historiaj notoj budhismo enkondukiĝis en Ĉinion en la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. — 23 p. K.). Poste, dank' al longtempa disvastiĝo, ĝi iom post iom eliris el la imperiestraj palacoj kaj aristokrataj domoj kaj fariĝis religio kredata de grandnombraj ordinaraj popolanoj. En la dinastioj Sui kaj Tang (581-907) budhismo atingis la kulminon de sia disvolviĝo en Ĉinio. Tiam sole en la urbo Chang'an estis 153 budhismaj temploj.


Inter la temploj en Xi'an (Ŝji'an) Famen okupis gravan lokon en la budhisma historio de Ĉinio. Koncerne tiun ĉi templon, bv. legi artikolon "Xi'an, la komenco de la Silka Vojo" en nia revuo n-ro 2, 1996. Ĉi tie mi diru nur kelkajn vortojn pri ĝi. Famen estas fama pro tio, ke en ĝi konserviĝas fingrostoj de Ŝakjamunio. Legendo diras, ke post la nirvano de la Budho, Asoka, reĝo de la antikva Hindio, ordonis demonojn kaj diablojn konstrui 84 000 budhismajn pagodojn en la tuta mondo por teni la budhajn relikvojn. La pagodo de Famen-templo estas unu el ili. Kvankam tio estas mito, tamen la templo Famen estis grandioza jam en Tang-dinastio. En 1987 oni malkovris 4 fingrostojn de la Budho en la subtera palaco de la

LAŬ LA SILKA VOJO

Budhismaj historioj ĉe la Silka Vojo

de ZHENG ZHENJIE

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





Orumitaj budhostatuoj faritaj en la jaro 592

templo. Unu el ili estis fingrosto de Ŝakjamunio. La malkovro faris la templon mondfama budhisma sanktejo.

En Tang-dinastio oni 9-foje bonvenigis solene budhajn relikvojn en la palacon. Tiam sur la 100-km-longa vojo de Chang'an ĝis Famen-templo kuris sennombraj veturiloj kaj ĉevaloj, miloj kaj miloj da budhistoj atendis ĉe la vojo. La muzikiloj tondris, flagoj flirtis, honora eskorto marŝis...

Enkondukiĝinte en Ĉinion, budhismo strikte ligiĝis kun la

ĉina kulturo kaj fariĝis religio de la vasta popolamaso de Ĉinio.

DAYAN-PAGODO KAJ BONZO XUANZANG

Dayan-pagodo situas en la templo Ci'en, en la suda parto de la antikva urbo Xi'an. Multaj opinias, ke la pagodo estas simbolo de la urbo. Ĝi estis konstruita por teni la sutrojn kaj budhajn statuojn alportitajn de bonzo Xuanzang (Ŝjüanzang) el Hindio. Xuanzang persone transportis brikojn kaj ŝtonojn dum ĝia konstruado.

La pagodo el grizaj brikoj majestas sur la fono de verdaj arboj kaj ruĝaj floroj sub la lazura ĉielo. Tiu 7-etaĝa pagodo altas 64 m. Ĝi kun konusa pinto estas kvintesenca de la ĉinaj budhismaj pagodoj kaj ankaŭ trezoro de la antikva ĉina arkitekturo.

Mi ĉirkaŭiris la pagodon kaj antaŭ mi kvazaŭ aperis la sceno, ke la juna bonzo Xuanzang pene iras sur la senlima dezerto por pilgrimado al Hindio.


Xuanzang origine nomiĝis Chen Hui. Li naskiĝis en 602 en budhista familio. Li bonziĝis en la aĝo de 13 jaroj. Li diligente studis budhismon kaj fariĝis budhisma erudiciulo kaj fama bonzo jam en la aĝo de 20 jaroj. Li lernis de multaj budhismaj majstroj. Por solvi malfacilojn en studado de sutroj kaj kapti la esencon de la budhisma doktrino li decidis iri al Hindio, la naskiĝloko de budhismo.

"Pilgrimado al la Okcidento" estas mita romano tre fama en Ĉinio. Ĝi estis verkita surbaze de la historio pri pilgrimado de Xuanzang al Hindio. Sun Wukong, heroo de la romano, estis superhoma simio, kiu protektis sian majstron Xuanzang en la pilgrimado kaj venkis multajn malfacilojn sur la vojo. La romano kaj heroo estas ŝatataj de ĉinoj, sed fakte en la historio Xuanzang iris sola al Hindio, protektate de neniu.

En 627 Xuanzang komencis sian vojaĝon de Chang'an. Laŭ la Silka Vojo li trairis Wuwei, Dunhuang, Gaochang (la nuna Turpan de Xinjiang) kaj multajn regnojn en centra Azio kaj venkis sennombrajn malfacilojn. Kiam li iris sur la 400-kilometra Gobio, li perdis la vojon, tute ne trinkis dum 5 tagoj kaj preskaŭ perdis sian vivon. Feliĉe, ke nokte malvarma vento vekis lin kaj lia ĉevalo portis lin al oazo, tiel ke li eldangiĝis. Xuanzang fine atingis nordan




La Nebula Puto en la templo Caotang




La Relikva Pagodo de Xuan-zang en la templo Xingjiao





La Relikva Pagodo de Kumaralabdha



Dayan-pagodo
Foto de LIU SHIZHEN

Hindion kaj lernis 5 jarojn de budhisma majstro Silabhadra en la supera budhisma seminario Nalanda. Tie li estis elektita kiel unu el la 10 famaj erudiciaj bonzoj pri budhismaj sutroj. Li vojaĝis en dekoj da regnoj en Hindio. Lia vojaĝlinio longis 25 000 km kaj liaj spuroj troviĝis en 110 regnoj en centra Azio kaj antikva Hindio.

En 645 li revenis en Chang'an, kunportante 657 budhismajn sutrojn.

Reveninte Ĉinion, Xuanzang longtempe okupiĝis pri tradukado de sutroj ĝis sia morto. Li tradukis entute 1 335 volumojn da sutroj. Li estis favorita de iu budhisma majstro en Hindio kaj lernis de li sekretajn sutrojn. Fakte, li estis majstro de la hinda budhismo. Krom tradukado, li ankaŭ notis siajn travivaĵojn pri la vojaĝo, inkl. de pejzaĝoj, urboj, produktoj kaj moroj de la 110 regnoj, kiujn li vizitis. Lia verko "Vojaĝo al la Okcidento Far Tang-dinastia Bonzo" estas grava por studi historion kaj geografion de la Hinda Subkontinento kaj centra Azio.

FAMAJ BONZOJ SUR LA SILKA VOJO

Post la malfermiĝo de la Silka Vojo multaj famaj bonzoj venis al Ĉinio por disvastigi budhismon, spite longan vojon kaj danĝerojn sur la dezerto.

Plej frue venis al Ĉinio la hindaj bonzoj Kasyapamatanga kaj Dharmaratna.

En historiaj libroj legiĝas, ke en la jaro 64 imperiestro Liu Zhuang de la Orienta Han-dinastio (24-220 p.K.) songis oran homon, kiu en sun-luna vesto flugis super la palaco kaj ne volis foriri. En la sekvinta tago li diris la sonĝon al la korteganoj. Iu el ili diris al li, ke tio estas magia fardo de la hinda budho. Aŭdinte tion, Liu Zhuang ege ĝojiĝis kaj decidis sendi 18 diplomatojn al Hindio por peti budhismajn sutrojn. Kiam la diplomatoj atingis la regnon Dajouĝi en la nuna Afganio, ili vidis la famajn bonzojn Kasyapamatanga kaj Dharmaratna iri orienten kun statuo de Ŝakjamunio kaj 42 volumoj da budhismaj sutroj portataj per blanka ĉevalo. La diplomatoj kaj hindaj bonzoj

kune venis al Luoyang, la tiama ĉefurbo de Ĉinio. Vidinte la sutrojn, la ĉina suvereno ege ĝojiĝis kaj ordonis konstruigi la templon Baima en la antaŭurbo de Luoyang (Baima signifas blankan ĉevalon en la ĉina lingvo). Tiu templo estis la unua budhisma templo konstruita post la enkondukiĝo de budhismo en Ĉinion. De tiam multaj famaj bonzoj ĉinaj kaj alilandaj venis tien por traduki sutrojn, prediki kaj labori super verkado. La templo Baima estis honorita kiel la unua budhisma loko kaj fonto de sutrotraduko en Ĉinio. Nun ĝi restas unu el la plej gravaj budhismaj monaĥejoj de Ĉinio.

La templo Caotang estas malpli fama ol Baima, tamen ĝi, sudokcidente de Xi'an je 30 km, estis loko, kie la fama hinda bonzo Kumaralabdha predikis kaj tradukis sutrojn.

Kumaralabdha naskiĝis en la regno Qiuzi (Ĉiŭzi) en la nuna Kuche de Xinjiang. Li bonziĝis en la aĝo de 7 jaroj. Li estis ekstreme saĝa, bone konis la klasikajn verkojn de budhismo kaj ĝuis reputacion en la socio. En 401 li venis al Chang'an laŭ invi-



La templo Daxingshan, unu el la tri grandaj tradukejoj de sutroj en Chang'an

to kaj respondecis pri tradukado de sutroj en templo en la orienta parto de la urbo. Oni diris, ke pli ol 3 000 homoj partoprenis la tradukadon kaj ili tradukis 427 volumojn de 97 sutroj el la sanskrito. Tio estis la unua fojo, ke oni grandskale tradukis sutrojn en la ĉinan lingvon. Post la morto de Kumaralabdha oni kremaciis lin kaj enterigis la cindron en la templo Caotang.

En bela mateno mi veturis per aŭto al Caotang. En la ĉefa halo de la templo estis kultata la statuo de Ŝakjamunio kaj antaŭ la statuo estas 1.9 m alta statuo de Kumaralabdha el *nanmu*-o (bonkvalita ligno). La statuo kun alta nazo kaj profundaj orbitoj sidas sur lotusa trono, kun okuloj rigardantaj malproksimen.

En la templo staras la Relikva Pagodo de Kumaralabdha. Oni diris, ke la pagodo estis konstruita en la jaro, kiam Kumaralabdha nirvanis. Por konstrui la pagodon oni transportis ŝtonojn el okcidente. Iuj el ili estis 5- aŭ 8-koloraj. La ŝtona pagodo estas jadbrila eĉ hodiaŭ, eble pro longtempa frotado de vizitantoj. Memore al li, oni konstruis alian pagodon en la urbo Wuwei ĉe la Silka Vojo. El tio videblas, ke grava estas tiu ĉi bonzo en la okuloj de la ĉina popolo, same kiel bonzo Xuanzang de Tang-dinastio.

Forlasinte la pagodon, mi iris nordokcidenten laŭ prospera bambuaro kaj post nelonge venis al "Nebula Puto". La aperturo de la putto estas negranda. La akvosurfaco troviĝas je 2 metroj sub la aperturo. Oni diris, ke en la antikveco, matene de aŭtuno kaj vintro ofte leviĝis nebulo el ĝi. La nebulo ŝvebis super la templo kvazaŭ longa drako kaj poste direktis sin nordorienten al la ĉefurbo Chang'an. Ĝi estis unu el la 8 famaj vidindaĵoj de Chang'an.



Bonzo Xuanzang survoje al la Okcidento (Stelea kopiaĵo)



Budhostatuoj elterigitaj en Famen-templo
Foto de DA WEI

La templo Baima



La riparita subtera palaco de Famen-templo Foto de DA WEI



En malriĉa loko de Gansu

de BING CHUAN

EN 1980 la Financa Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko starigis Fonduson por Ekonomia Disvolviĝo de la Subevoluintaj Regionoj kaj asignis specialajn sumojn por helpi la malriĉajn lokojn. Tiam iuj dubis pri la efiko de la fonduso. Pasis 15 jaroj. Kiuj ŝanĝiĝoj okazis en la regionoj, precipe en la nacimalplimultaj regionoj, helpitaj de la fonduso? Kiujn profitojn ricevis la popoloj? Kun tiuj demandoj mi vizitis Gansu, malriĉan provincon en nordokcidenta Ĉinio kaj precipe la Linxia(Linŝja)-an Aŭtonoman Huj-nacian Subprovincon, la plej malriĉan lokon de la provinco.

En Lanzhou, ĉefurbo de la provinco, mi konatiĝis kun s-ro Chen Shide, kiu respondecas pri distribuo de la fonduso. Li sin okupis je la laboro jam en la komenco de ekfunkciado de la fonduso. Li diris al mi, ke en Gansu estis 20 gubernioj helpendaj, kiuj konsistigis trionon de la malriĉaj gubernioj de la lando. La 18 gubernioj en la meza parto de la provinco estis ofte atakataj de trosekeco. Tie mankis manĝaĵoj, hejtaĵoj kaj furaĝoj. Kaŭze de la malfavoraj naturaj kondiĉoj la tieaj loĝantoj vivis tre malfacile en multaj jaroj. La registaro asignis grandan monsumon por helpi la lokon, tamen tio solvis la problemon nur portempe kaj ĉiufoje, kiam okazis katastrofo, multaj homoj devis vivi de la ŝtata subvencio. Sed la fonduso por ekonomia disvolviĝo estas uzata ĉefe por fundamenta konstruado de la kamparo kaj akvoutiliga konstruado cele pliiĝi la rezistpovon kontraŭ la naturaj katastrofoj kaj radikale solvi la viv-malfacilojn de la kamparanoj. S-ro Chen diris al mi: "De 1980 ĝis nun la ŝtato asignis 830 milionojn da juanoj por la ekonomia disvolviĝo de



Intervjuo kun estro de la provinca oficejo pri helpo al malriĉaj gubernioj

nia provinco kaj la provinca registaro asignis por tio pliajn 236 milionojn da juanoj. 79.34% de tiuj monsumoj estas senkompensaj kaj triono de ili estas uzata en la nacimalplimultaj regionoj. Dank' al tio 4.27 milionoj da loĝantoj de la provinco jam liberigis sin el malriĉeco kaj radikale solvis la problemon de manĝaĵoj kaj vestoj.

S-ro Chen proponis al mi viziti iujn lokojn de la provinco kaj mi veturis al la Linxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Subprovinco.


Linxia situas meze de la provinco. Ĝi konsistas el 7 gubernioj kaj unu urbo, kies 70% de la agroj troviĝas sur montoj. Tie la trafiko estis maloportuna kaj ekonomio postiginta. Pro seriozaj erozio kaj naturaj katastrofoj la loko estis malriĉa kaj longtempe helpata de la ŝtato.

Por havi pli detalan informon pri tio mi veturis al vilaĝoj.

Nia ŝoforo Wang (Ŭang) estas parolema. Survoje li multe konigis al ni la subprovincon. Nia aŭto veturis ĉ. unu horon. Ambaŭflanke de la vojo vidiĝis multaj loĝdomoj tre similaj al tiuj en la urboj.

Ni turnis nin flanken sur asfaltitan vojon, sur kiu povas paralele iri du kamionoj. Ambaŭflanke de la vojo kreskas poploj. Malantaŭ la arboj sterniĝas verda kampo. Nelonge post nia ekveturo, aperis iu vilaĝo. S-ro Wang diris al mi: "Tie estas huj-nacia vilaĝo. Ĝi estis malriĉa en la estinteco, sed kiel ĝi statas nun, mi ne scias."

Nia aŭto eniris en la vilaĝon, ankaŭ kiun trapasas asfaltita vojo. Apud la vojo staris kelke da duone malkonstruitaj kabanoj. Irinte pli antaŭen, ni vidis vicon post vico da bonorde aranĝitaj brik-



S-ro Ma kaj liaj laktobovinoj

domoj. Meze de la vilaĝo staris moskeo kaj apud ĝi elementa lernejo.

Estis antaŭtagmeze kaj en la vilaĝo videblis nur tre malmultaj homoj. Mi vidis kelkajn virinojn, kiuj lavis vestojn ĉe la rivereto. Ni eniris en iun korton, kie knabino melkis bovinon. Ni konigis ŝin pri nia volo. La knabino invitis nin al la interna korto kaj prezentis al ni sian patron. Mastro Ma diris al ni, ke antaŭ 5-6 jaroj en la vilaĝo duono de la loĝantoj estis ĉagrenitaj de la problemo de manĝaĵoj kaj vestoj. Poste la registaro subvenciis ilin kaj ili ekfunkciigis bredejon de laktobovinoj, ĉar la loko estas abunda je herboj kaj la loĝantoj spertaj en bredado. La vilaĝa komitato respondecas pri aĉeto de laktobovinoj por malriĉaj familioj, kiuj havas malfacilon en disvolvo de la produktado. La vilaĝa komitato sendas fakulojn konigi sciojn pri bredado, kuraci bestojn kaj vendas por ili bovidojn kaj lakton. Poste tiuj familioj kvitiĝas kun la vilaĝa komitato per la mono gajnita de vendo de lakto kaj bovidoj. S-ro Ma, montrante la du bovidojn melkatajn de lia filino en la ekstera korto, diris al ni, ke nun ĉiu bovino povas enspezigi al li pli ol 2 000 juanojn jare. Iuj bredantoj, kiuj ekokupis sin je tiu laboro frue, jam solvis la problemon de manĝaĵoj kaj vestoj. Nun en la vilaĝo estas pli ol 500 bredistaj familioj. Iuj el ili sin liberigis el malriĉeco kaj parto de ili eĉ bonhaviĝis.

“Kion vi volas fari per la mono?” mi demandis.

S-ro Ma kun fiero respondis al mi: “Konstrui vojon kaj lernejojn. Ĉu vi trovis diferencon inter la vojo en nia vilaĝo kaj la ŝtata ŝoseo? Preskaŭ ne. En la pasinta jaro la vilaĝa komitato kaj loĝantoj ĉiuj pagis monon por konstrui elementan lernejon kun sportejo. Nun en nia vilaĝo ĉiuj

infanoj vizitas lernejon.” Li montris du tapiŝojn sur la muro kaj diris: “Vidu, tiujn tapiŝojn mi aĉetis en Mekko, kiam mi pilgrimis tien. En la pasinteco ni eĉ ne havis monon por veturi al la gubernia urbeto.”

Ni adiaŭis la vilaĝon kaj veturis al Beiyuan, grena bazo, irigaciata per akvo pumpita el la rivero Daxia (Daŝja) tra la akvokonduka tubo, instalita en 1957, sed post multjara funkciado la tubo jam ne povis kontentigi la bezonon por la irigaciado kaj ĉiutaga vivo. Komence de 1990 la subprovinca registaro donis 2 600 000 juanojn kaj bezonatajn instalaĵojn kaj konstruis kaj rekonstruis 70 tunelojn kaj kanalojn, faris 11.1 km da masonita kanalo en tri jaroj. Dank’ al tio oni solvis la akvan problemon por 100 000 homoj kaj 60 000 brutoj kaj garantias la irigaciadon de 9 000 hektaroj da kampoj.

Sur la revena vojo nia aŭto trairis ŝtonan ponton kaj s-ro Wang rakontis al ni pri ĝia historio. La rivero trairas la vilaĝon ĝuste en ĝia mezo. La loĝantoj, precipe la infanoj, devis travadi ĝin por iri al la lernejo. Por solvi la malfacilon de la tieaj popolanoj la subprovinca registaro asignis 290 000 juanojn por konstrui tiun ĉi ponton 82 m longan kaj 4.5 m larĝan kun 6 spanoj. En la tago de ekfunkciado de la ponto iu vilaĝano kun larmoj diris: “Nun realiĝis nia deziro de kelkaj generacioj. De hodiaŭ feliĉo torentos al ni de tiu ĉi feliĉiga ponto.” Kvankam la ponto portas la nomon de la vilaĝo, tamen la tieaj loĝantoj preferas nomas ĝin Feliĉiga Ponto.

S-ro Chen diris al ni, ke estas ankoraŭ multaj laboroj por elliberigi la tieajn loĝantojn el malriĉeco. Li diris ankaŭ, ke ili bone administros la fonduson, por ke la mono cirkulu pli rapide kaj donu pli grandan efikon. ■

IMPRESOJ PRI SUDA HENAN-PROVINCO

EN Henan-provinco estas la urboj Luohe kaj Xinyang (Ŝinjang) ĉe la Pekin-Kantona Fervojo.

Unu el la luliloj de la ĉina civilizacio estas Henan, kie oni povas ne nur ĝui la brilan antikvan civilizacion de Ĉinio, sed ankaŭ vidi la tieajn ŝanĝiĝojn.

SHUANGHUI-GRUPO

Antaŭ ol viziti Henan-provincon, mi jam konis, ke en Luohe estas Shuanghui-grupo fama tra Ĉinio, kiu ĉefe produktas kolbasojn.

Atinginte Shuanghui-grupon, mi estis mirigita de ĝia granda skalo. Ĝi, el 5 fabrikoj kun pli ol 7 000 laboristoj, ĉiutage produktas pli ol 500 tunojn da kolbasoj. Mi eniris ĝian trian fabrikon. Tio estas 5-etaĝa arĝentkolora domo, tre okulfrapa sur vasta kampo. Endomiĝinte, mi vestis min per laborvesto laŭ la regulo de la fabriko. Kaj post malinfektiĝo mi lifte venis en laborejon helan kaj puran. Peklado, malinfekto, fumajado, pakado kaj aliaj laboroj estas plenumataj per produkta linio regata de komputiloj. Sen anticipa kono pri la laborejo oni eble ne scias, kion tie oni faras. Nur ĉe la fino de la produkta linio videblas la pakitaj kolbasoj. Mia akompananto prenis kolbasojn kaj donis

ĝin al mi, ke mi gustumu. Ja bongusta!

Mi informiĝis, ke en la pasintaj jaroj en Henan-provinco unu post alia fondiĝis viandprilaboraj entreprenoj inkluzive de Shuanghui. Ili intense konkurencas por siaj produktoj. Per kio do Shuanghui povas ne nur famigi sin enlande sed ankaŭ havigi al si grandan debiton en internacia merkato?

La ĝenerala direktoro de Shuanghui klarigis al mi, ke tuj post sia fondiĝo ĝi difinis al si la celon "Shuanghui estu praktikanto de novaj teknikoj" kaj "produktoj de Shuanghui fariĝu mondfamaj". Tio donis al ĝi altan startpunkton en la komenco de la disvolviĝo. En 1991-1992 Shuanghui enkondukis 40 produktajn liniojn kun la internacia nivelo de la 90-aj jaroj el Japanio, Svislando, Germanio kaj Aŭstrio. Ĝi produktas kolbasojn, diversajn pecojn de buĉitaj porkoj kaj bovoj, ladmanĝojn, trinkaĵojn kaj aliajn pli ol 300 specojn da produktoj.

Kaj plie Shuanghui donas grandan atenton al kvalito de siaj produktaĵoj. Por trovi plej taŭgajn materialojn kaj kondimentojn ĝi faris provojn foje refoje. Dank' al tio ĝiaj kolbasoj el 85% da magra viando restas altkvalitaj dum 3 monatoj se ili

estas tenataj en normala temperaturo, kio donis al la grupo fortan konkurenccpovon en la internacia merkato.

Henan estas granda agrikultura provinco. Tie oni bredas multajn porkojn kaj bovojn. Kaj krome tie la trafiko estas facila, la prezo de viando malalta. Sendube tio estas tre utila por la ekonomia disvolviĝo. La rapida disvolviĝo de Shuanghui estas ĝojiga. Ĉar antaŭ nur kelkaj jaroj ĝi estis malgranda viandprilaborejo el 300 laboristoj, kun simplaj instalaĵoj. Nun ĝi faras pluan penadon por pli rapida disvolviĝo. Nun ĝi kontaktiĝas kun entreprenistoj el Italio, Usono, Kanado, Hongkong kaj Taiwan por kune produkti kolbasojn, altklasajn tujvermiĉelojn, prilaboraĵojn el maizo kaj sojfaboj, kaj eĉ medikamenton el ostoj. Laŭ takso, antaŭ la fino de la 20-a jarcento Shuanghui fariĝos translanda korporacio kun jara produktov valoro de 8.5 miliardoj da juroj.

KOMPANIO FONDAS BAZLOKON EN KAMPARO

En Luohe mi trovis, ke grandaj kompanioj konstruas bazon de materialoj en kamparo, ekz. Shuanghui fondis bazlokon de porkoj, kiu multe helpas la proksimajn kamparanojn, kaj sekve de tio la kamparanoj jam fariĝis nedisigebla parto de Shuanghui-grupo. Tio ne nur garantias sufiĉajn materialojn al la entreprenoj sed ankaŭ pliigas enspezon de la kamparanoj. En Xinyang, la plej suda urbo de Henan-provinco, ĝuste per tia maniero sukcesis Huaying-grupo de kortobirdoj.

De Luohe al Xinyang ni veturis 5 horojn. La sekvintan tagon mi vizitis Huaying-grupon, kiu sidas en Huangchuan-gubernio de la urbo Xinyang. Ĝi estas konstruita per pruntita

monsumo de la brita registaro en 1989 kaj enkondukis bonrasajn anasojn el Britio. Nun ĝi estas sinteza entrepreno, kiu elovigas anasidojn, buĉas anasojn, ilin prilaboras, fridigas kaj faras vestojn el iliaj plumoj.

Huangchuan-gubernio, unu el la malriĉaj gubernioj de Ĉinio, situas en montregiono. Por liberigi kamparanojn el malriĉeco kaj ankaŭ por havigi al si sufiĉajn materialojn Huaying decidis bredigi al pli ol 6 000 kamparanaj familioj la bonrasajn anasojn. Ĝi garantias al la kamparanoj: liveri bonkvalitajn anasidojn, sufiĉan anasnutraĵon kaj kontentigan servon (ekz. preventi kaj kuraci malsanojn de la anasoj), aĉeti ĉiujn plenkreskajn anasojn kaj ĉiu anaso enspezigas almenaŭ unu juanon.

Tamen ĉe la komenco la afero

iris ne glate.

“Ni neniam bredis fremdlandajn anasojn. Kion fari, se ni malprofitus?” unuvoĉe diris la kamparanoj.

“La kamparanoj estas praktikemaj,” diris Cao Jiafu, 38-jara direktoro de la entrepreno. Tiu mezaĝulo en simpla vesto elspiras neordinaran temperamenton. Liaj okuloj estas brilaj kaj paroltono decidema. Parolante pri la travivaĵoj de sia kompanio, li konigis al mi, ke tiam li kaj liaj kolegoj vizitis kamparanojn kaj al ili propagandis la utilon de la bredado, pruntedonis monon, donis lecionojn pri la tekniko de la bredado kaj eĉ helpis ilin konstrui anasbredejon. Iu kamparano, nomata Huang Xugen, okupita je terkulturo kaj butikado, vivis bonhave. Tamen li estis lernema kaj la unua en sia vilaĝo

bredis 60 000 bonrasajn anasojn. Estis frosta vintro, kiam li komencis bredi. Por teni konvencan temperaturon de la bredejo li 7-foje riparigis la varmigojn. La anasidoj kreskis kaj post 45-48 tagoj ili pezis ĉiu pli ol 3.2 kilogramojn kaj atingis la normon por eksportiĝi. Lia sukceso kuraĝigis la samvilaĝanojn. Tie tuj aperis granda entuziasmo pri bredado de la bonrasaj anasoj. Mi vizitis ankaŭ la anasbredejon de Luo Honglin. Li estas juna kamparano. En 1995 li bredis 300 000 bonrasajn anasojn kaj lia jara enspezo superis 200 000 juanojn.

Ke kompanio fondas bazlokon en kamparo, tio jam sukcesis en aliaj landoj. Ankaŭ iuj lokoj de Ĉinio provas tion kun la celo liberigi kamparanojn el malriĉeco. La sukceso de Huaying montris, ke la metodo estas taŭga por iuj regionoj de Ĉinio kaj ĝia efiko ankaŭ bona. ■


Ĉe produkta linio de Shuanghui-kolbaso

Foto de ZHENG ZHENJIE



PANG NAIYING:

Fabela loko Guilin



CINOJ diris, ke la pejzaĝo de Guilin estas la plej bela en Ĉinio. S-ro R. Nixon, iama prezidento de Usono, laŭdis, ke Guilin estas tiel bela, ke neniuj urboj en la mondo povas rivali kun ĝi. Ĉiuj, kiuj vizitis Guilin, opiniis, ke dank' al Lijiang-(Liĝjang)-rivero, Guilin ĝuas grandan famon.

VOJAĜO SUR LIJIANG-RIVERO

Kelkaj boatoj flosas sur klara Lijiang-rivero.

Tio estas fakte malgranda floto el 5 longaj kaj maldikaj bambustangoj, kun 2 elstarantaj finoj. En ĝia meza parto sidas bareforma korbo kun fruktoj aŭ radikaj skulptaĵoj ene. Nudpiede starante sur la pruo, flosisto rapide kondukis ĝin per longa bambukano. Post nia plezurŝipo ofte kuris tiaj flotoj. Kiam la floto proksimiĝis al nia ŝipo, la flosisto alproksimiĝis al nia ŝipo per hoko kaj vendis lokajn produktaĵojn al turistoj. Poste, ili alproksimiĝis al alia ŝipo... Tion faras junuloj, dum maljunuloj sidas sur floto, gardante nigrajn fiŝglojn. La malbelaj fiŝgloj kun malgrandaj okuloj, larĝa beko kaj granda veziko sub la kolo de tempo al tempo sin ĵetas en la akvon kaj kaptas fiŝojn...

Ambaŭborde de Lijiang-rivero arbore staras kuriozaj montoj similaj al bambuoso, lotuso, ekranoj,

domo, galopanta ĉevalo, juna virino atendanta sian edzon, kverelantaj monaĥoj...

Nia ĉiĉerono diris, ke antaŭ 300 milionoj da jaroj tie estis vasta maro. Pro ŝanĝiĝo de la terkrusto, laŭdoj leviĝis de la mara fundo kaj formis novan teron kun tia aspekto post elfloreskado. Lokanoj diris, ke sennombraj karstaj grotoj sin kaŝas sub tiuj montoj. Homaj prapatroj iam loĝis en tiuj grotoj. Kaj tie hodiaŭaj lokanoj produktas sojfabbermojn, kulturajn bonspeciajn riz-sembrojn, sin refreŝigas somere kaj ĝuas la lunon aŭtune...

Infanoj, tute nudaj, ludas en akvo kaj salute krias al ŝipoj. La de ili paŝataj bubaloj lante naĝas al la alia bordo, tie ĉarmas fiŝista vilaĝo, etendiĝas sukerkana kampo kaj prosperas bambuoj. Ŝajnas, ke mi legas fabelon belan kaj antikvan. Mi volis eniri en la profundon de la fabelo kaj viziti antikvan urbeton, montan vilaĝon, bambuajn domojn alproksimiĝantajn al monto...

VIZITO AL VILAĜO DE JAŬ-OJ

Bambuaj domoj alproksimiĝas al krutaj montoj kaj ferĉenaj pontoj pendas super profundaj valoj. Tie, kie troviĝas tiaj bambuaj domoj, certe ŝprucas fontoj kaj vivas jaŭ-oj.

Iu jaŭ-a knabino invitis min al sia hejmo kaŝita en bambuaro. Tio estas eleganta domo duone al-

kroĉiganta al monto kaj duone pendanta en la aero, subtenata per kelkaj maldikaj fostoj. Ĝiaj familianoj loĝas en la supra etaĝo, dum la brutoj kaj kortobirdoj en la malsupra. Ŝi diris al mi, ke ankaŭ ĝiaj najbaroj loĝas tiamaniere.

En la domo preskaŭ ne estas mebloj. Sur la planko troviĝas fajrujo kaj sur la plafono pendas maniokoj, greno de ŝia familio. Ŝi kantis por mi kanton tre antikvan. Ŝi sciigis al mi, ke ĉiuj jaŭ-oj ŝatas kanti. Printempe la tuta vilaĝo helpas al la familio, kiu ekspluatas virgan teron. Tie la maljunulo portas surdorse grandan bovledan tamburon. La ĉefkantisto unue kantas, frapante la tamburon, kaj la aliaj ĝoje laboras, unuvoĉe eĥante. Ili opinias, ke nur tiele oni povas vekti la montan dion kaj sub ties benado kaj protektado akiri ĝojigan rikolton.

Hejmen reveninte post la laboro, jaŭ-oj sin banas. Enverŝinte en poton fontakvon kaj dekkelkspecajn drogherbojn, oni boligas kaj poste verŝas ĝin en lignan barelon longan je 2 m, larĝan kaj altan je unu m. respektive. Unue oni sin banas en vaporo, sidante ĉe la rando de la barelo. Kiam la akvo ne tiel varmas, ili sin banas en la barelo, sidante aŭ kuŝante. Laŭdire tia bano estas senlaciga kaj efika por kuraci reŭmatismen kaj malvarmumon.

Prepari la drogherban banakvon estas laboro de la virinoj. Vespere ili devas fari tion en varma vaporo kaj la drogherba aromo agrablas super la tuta vilaĝo...

La vilaĝaninoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, emas porti rozkoloran senkoluman veston. Ili diris, ke ili estas ruĝaj jaŭ-oj. Tiuj vestoj estis trikitaj kaj broditaj de ili mem. En infaneco ili eklernis tion de la patrino kaj tion faras eĉ en la aĝo de pli ol 70 jaroj.

Montaninoj estas laboremaj. Kun bebo surdorse, ili transportas bambuojn en monto kaj laboras sur kampo. Eĉ kiam ili vizitas foiron, ili portas korbon da mandarinoj por vendo.

VIZITO AL FOIRO

En foiro ĉie vendiĝas mandarinoj bongustaj kaj malmultekostaj.

La vizitantoj el norda Ĉinio ŝatas aĉeti momordikon (*Momordica grosvenori*) rondan kaj brunan. La momordikino estas 500-oble pli dolĉa ol sukero. Ĝia infuzaĵo estas efika por kuraci tusadon, astmon kaj hipertension, kaj utila al hepato kaj lieno. Ankaŭ alilandanoj ŝatas ĝin kaj nomas ĝin "orienta mirfrukto".

La malgranda foiro troviĝas sub antikva ponto. En seka sezono oni komercas tie. Tie oni vendas frititajn kukojn el glueca rizo. Najbare de kukovendisto maljunulo rostis en malgranda poteto kaŝtanojn, kio allogis multajn aĉetantojn.

Helikoj kuiritaj per milda fajro estas bongustaj kaj la vendisto — babilema. Li diris al mi, ke la helikoj vivas en riz-kampo. Elakviginte ilin, oni unue bredis ilin en klara akvo, por ke ili forvomu ŝlimon. Foriginte ilian pinton, oni kirle fritetis ilin kun spicaĵoj per akra fajro, poste kuiris ilin per milda fajro kun kapsikoj, osto k.a.

Mi haltis antaŭ la knabineto kun sunbruna vizaĝo kaj granda pajla ĉapelo surkape. Ŝi estis vendanta sovaĝajn prunojn. Ŝi diris al mi, ke ŝi estas ĝuang-o. Kun granda plezuro ŝi kolektis sovaĝajn prunojn en monto. Soifanta, ŝi trinkis fontakvon. Malsata, ŝi manĝis baŝoojn (*Musa basjoo*)... Mi volis foti ŝin, sed ŝi petoleme ŝirmis la okulojn per la pajla ĉapelo kaj ŝtele ridis.

Mi deziris ankaŭ rigardi la pluvo-vento-ŝirman ponton en vilaĝo de dong-oj, aŭskulti amkantojn de ĝuang-oj, serĉi la fonton de Lijiang-rivero en Kato-monto... Sed bedaŭrinde, tempo tion ne permesis, mi do nur petis de la petolema knabineto kelkajn sovaĝajn prunojn por fari tripunkton je la fino de mia artikolo. ■



En vendejo de turismaj memoraĵoj



En la tetrinkejo Shuyuan

MENG XIA:

Tetrinkejoj en Hangzhou

HANGZHOU estas altira pro sia ĉarma Okcidenta Lago kaj fama pro sia *longging*-teo. En pluveta printempo sennombraj turistoj vizitas la belan lagon kaj multe da aliaj homoj venas tien por trinki la teon dolĉan kaj freŝan.

Menciante tetrinkejon, ĉinoj ofte asocias ĝin kun tiu en la malnova Ĉinio, kiam la tetrinkejo estis brua kaj fumoplena. Sed en la lastaj jaroj tetrinkejoj de Hangzhou multe ŝanĝiĝis. La nunaj tetrinkejoj, kvietaj kaj elegantaj, estas ofte vizitataj de kleruloj. Ili ne plu funkcias kiel rendevuejo por personoj de diversaj socitavoloj. En tiuj teartaj aŭ te-ceremoniaj trinkejoj oni ĝuas ian novan etoson.

Enirinte Taiji(Tajĝji)-tetrinkejon kun areo de pli ol 20 kvadrataj metroj, mi trovis bonorde metitajn tablojn kaj seĝojn nelakitaj kaj antikvecajn servicojn por teo. La klientoj atenteme gustumis la teon, unue amaran kaj poste dolĉan, kun akompano de antikva kordinstrumento *geng*-o. Mastro de la tetrinkejo Zheng Chunhui pretendis, ke li estas modoĉasanto kaj ofte vizitis kokakolejon, bierejon kaj kafejon. Li asertis, ke alilandaj trinkaĵoj malfacile enradikiĝas en Ĉinio, kaj nur la teo, multe ŝatata de la ĉinoj dum jarmiloj, jam profunde enradikiĝis. Sekve li decidis funkciigi tetrinkejon por disvolvi tradiciajn virtojn de la ĉinoj. Li entreprenis la tetrinkejon jam unu jaron.

Tetrinkejo Fengda aspektas malsame al Taiji-tetrinkejo. Ĉiuj fenestroj de la tetrinkejo surhavas grandan ideogramon kun la signifo de "teo", sur la kvadrataj kolonoj legiĝas famaj versparoj kaj poemoj pri teo, skribitaj de lokaj kaligrafoj. Oni kvazaŭ eniris en galerion. Ye Jianjun (Je Ĝjangjun), mastro de la tetrinkejo, estas pentristo. Li diris, ke li invitis artistojn al la tetrinkejo kaligrafi kaj pentri, por ke kunfandiĝu tie la te-ceremonio, kaligrafio kaj pentrarto, kaj oni akiru spiritan edifon en tiu etoso.


"Krom vendi teon, mi donas al la klientoj belan

ĝuon kaj sciojn pri te-kulturo," diris gracia kaj kvietta fraŭlino Zhang Xiaohong (Ĝang Ŝjaŭhong) pri sia celo fondi la tetrinkejon Shuyuan. Ŝia tetrinkejo estas en klasika korto kun halo, longa koridoro, pavilono kaj fluo. Tie oni ofte okazigas prezentojn de teceremonio kaj tearto. Tiuj aktivadoj povas konigi al la rigardantoj la ĉinan te-kulturon kaj sciojn pri te-preparado. Ekz. oni ne devas infuzi teon per bolanta akvo, sed per akvo de ĉ. 80°C. Per tia akvo infuzita teo havas koloron, odoron kaj guston. Kiel percepti la temperaturon de akvo? Zhang Xiaohong klarigis, ke kiam la akvo boliĝas, oni demetu la tekruĉon de fajro por dekkelkaj sekundoj ĝis kiam malaperas en ĝi vaporbobeloj, tiam la akvo estas de ĉ. 80°C. Ŝi konigis ankaŭ, kial oni trifoje klinas la versilon de kruĉo dum te-infuzado. Tio signifas saluton al la tetrinkantoj kaj celas turnadi ĉiujn tefoliojn en la taso, por ke ili ĉiuj ricevu egalan varmon, dank' al tio la teakvo fariĝas bongusta kaj kolorplaĉa.

Inter la tetrinkejoj en Hangzhou, Yuena-tetrinkejo estas aparte interesa. Ĝi servas per bruna ŝaŭmteo, furoranta en Taiwan-provinco de Ĉinio. Ĝiaj preparado, koloro, gusto kaj odoro estas originalaj. La tetrinkaĵo estas preparata per la maniero kiel por koktelo. Ĝi disdonas aromojn de floro, frukto kaj alkoholaĵo. Koloroj de la teo estas ruĝa, flava, verda kaj blanka. Oni donas al ĝi romantikajn nomojn, kiaj Orienta Belulino, Ruĝa Koro kaj Songŝo de Amanto. Mastro de la tetrinkejo Han Qing (Han Ĉing) esperas, ke oni ŝatos tiun ĉinan teon kun okcidenta trajto.

La tetrinkejoj de Hangzhou aldonis novan pejzaĝon al la pitoreska urbo. Fakte, la formo de la tetrinkejo ne gravas, sed gravas la strebado kaj ŝanĝiĝo de la spirita vivo de homoj. Tetrinkado estas ordinara afero en la vivo de la ĉina popolo. Sed kiel pli bone trinki la teon, tio ne estas simpla afero. Jen pro tio oni entreprenas novtipan tetrinkejon en Hangzhou. ■

Ŝanhajo, urbo de la Unua Azia Kongreso de Esperanto



Ŝanhajo en nokto

DUM la 79-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo, aziaj esperantistoj dufoje kunsidis por diskuti pri la azia E-movado. En la kunsidoj oni decidis establi Komitaton pri la Azia E-movado kaj okazigi Azian Kongreson de Esperanto. La unua kongreso okazos en Ŝanhajo de la 22-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1996.

Ŝanhajo situas meze de la ĉina marbordo kaj ĉe la enfluejo de Yangzi-rivero. La urbon trafluas Huangpu-rivero. Antaŭ mil jaroj, tie estis ĉemaraj fiŝvilaĝoj. En la 13-a jarcento oni fondis urbeton kaj poste gubernion Ŝanhajo. Ekde tiam pli kaj pli multaj ĉinaj kaj alilandaj komercŝipoj venis tien. En la 16-a jarcento oni ekkonstruis urbomuron, kiu ĉirkaŭis la plej fruan kvartalon kun areo de 4.5 kvadrataj kilometroj. Post la Opia Milito en 1842 Ŝanhajo estis malfermita kiel komerca urbo. Okcidentaj potencoj dividis ĝin en koncesiojn. La urbo disvolvigis anomalie kaj fariĝis "paradizo de aventuristoj". Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 Ŝanhajo multe progresis kaj fariĝis la plej granda industria kaj komerca havenurbo de Ĉinio. Komence de la 90-aj jaroj la ĉina registaro decidis malfermi kaj ekspluati Pudong-distrikton (oriente de Huangpu-rivero). Post kelkaj jaroj Ŝanhajo rimarkinde ŝanĝiĝis. La urbo kun areo de 6 300 kvadrataj kilometroj kaj 13 milionoj da loĝantoj fariĝas internacia komerca kaj financa centro en la oriento.

En Ŝanhajo ne estas pitoreskaj montoj nek mondfamaj vidindaĵoj. Tamen per sia aparta ĉarmo ĝi logis multegajn

ĉinajn kaj alilandajn turistojn.

Ŝanhajo estas fama historia kaj kultura urbo. Ĝi okupas gravan lokon en la ĉina moderna historio. Multaj gravaj historiaj eventoj okazis tie kaj influis la tutan landon.

Ŝanhajo estas ankaŭ paradizo por aĉetantoj. Multaj ĉinoj ŝatas ŝanhajajn varojn pro ilia fidinda kvalito. Por eksterlandaj amikoj tre vizitindas la movoplena strato Nankino, la eleganta strato Huaihai en ekzotika gusto la nove dekoraciita populara strato Sichuan kaj la komerca kaj turisma kvartalo ĉe la ĝardeno Yuyuan.

Waitan ĉe Huangpu-rivero estas unu el la plej vizitinda loko de Ŝanhajo. Tie lokiĝas dekoj da eŭrop-stilaj domoj konstruitaj komence de tiu ĉi jarcento. Oni nomas ilin "Universala Arkitektura Foiro". Dum la lastaj jaroj Waitan multe ŝanĝiĝis. La plej okulfrapaj estas novaj altaj domoj kaj la Televida Turo "Orienta Perlo", kiu altas je 468 metroj.

La pontegoj Yangpu kaj Nanpu super la rivero Huangpu estas aliaj novaj pejzaĝoj de Ŝanhajo. En la urbo estas ankaŭ multaj muzeoj, ĝardenoj, zooj, temploj kaj preĝejoj.

Ŝanhajo estas lulilo de la ĉina E-movado. Jam komence de tiu ĉi jarcento fondiĝis la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, kiu estas la plej frua E-organizo de Ĉinio. Dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj Hujucz, Bakin, Ĵelezo, Tikos, Zhang Qicheng (Ĝang Ĉjiĉeng) kaj aliaj ĉinaj pioniroj fondis tie E-asociojn, eldonis revuojn, funkciigis E-kursojn kaj kulturis multajn esperantistojn. Ankaŭ V. Eroŝenko kaj Verda Majo prelegis kaj laboris tie. En

tiu periodo ŝanhajo estis la centro de la ĉina E-movado.

Tamen en la periodo de la "kultura revolucio" komencita en 1966 la ŝanhaja E-movado stagnis. Post la restariĝo de la Ŝanhaja E-Asocio en 1982, ŝanhajaj esperantistoj aktivis en disvastigo de Esperanto kaj faris internaciajn kulturajn interŝanĝojn. En 1983 la Ŝanhaja Universitato pri Internaciaj Studoj establis Esperanto-sekcion kaj ekde 1984 funkciigis E-kurson por sinsekvaj 5 jaroj. La kurso kulturis multajn Esperantajn instruistojn por diversaj altlernejoj de la lando. La universitato ankaŭ eldonis Esperantajn librojn kaj sonbendojn.

La Unua Azia Kongreso de Esperanto okazos en la Hotelo "Silka Vojo". La kongresa temo estas "Azio kaj la 21-a jarcento". Krom solenaĵoj, oni aranĝos ankaŭ prelegojn, laborkunsidojn, fakajn kunsidojn, vesperojn, prezentadon de akrobataĵoj kaj ekskursojn. La okazigo de la azia kongreso sendube progresigos la azian movadon.

Nun la ŝanhajaj esperantistoj sin preparas por varme bonvenigi diverslandajn gesamideanojn.

*Profesoro de la Ŝanhaja Universitato pri Internaciaj Studoj kaj prezidanto de la Ŝanhaja E-Asocio.

Utilaj informoj pri la kongreso

1. Kotizo (ekde la 1-a de aprilo 1996)

100,00 USD por landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko, Latin-Ameriko kaj iamaj socialismaj landoj; 160,00 USD por ĉiuj aliaj ne menciitaj landoj.

2. Loĝado

La loĝiga oferto estas varia kaj povas kontentigi ĉiun loĝdeziron. Ĉiuj cititaj prezoj estas en usonaj dolaroj (USD) kaj estas por unu nokto, por unu persono kaj sen matenmanĝo.

A. **Hotelo "Silka Vojo"**, kongresejo, estas tristela. Loko en dulita ĉambro kostas 23,00 USD.

B. **Universitata Apartamento** estas klimatizita kaj havas necesejn kaj duŝejon. Ĝi troviĝas je 15-minuta promenado for de la kongresejo. Loko en kvarlita ĉambro por unu nokto kaj por unu persono kostas 4,00 USD.

C. **Universitata Gastejo** distancas je 15-minuta piedirado for de la kongresejo. Loko en kvarlita ĉambro kun elektra ventumilo kaj komunaj necesejo kaj duŝejo kostas 2,00 USD.

Ĉ. **Studenta Loĝejo** vizaĝas al la gastejo. Loko en kvarlita ĉambro kun elektra ventumilo, komunaj necesejo kaj duŝejo de malvarma akvo kostas 1,50 USD.

3. Manĝo

Oni povas manĝi en la hotelo, gastejo aŭ studenta loĝejo. Estas konsilinde fari mendojn, se oni deziras manĝi malmultekoste.

Tri manĝoj tage en la hotelo kostas 15,00 USD.

Tri manĝoj tage en la gastejo aŭ studenta loĝejo kostas 11,00 USD.

La **bankedo** havos riĉan menuon kun variaj gustoj. Vegetaranoj ricevos same riĉan menuon kun nutraj ĉinaj manĝaĵoj. Prezo: 25,00 USD.

4. Akrobataĵoj de Ĉinio tre famas en la mondo. Indas

spekti en la kongresurbo, kies akrobata trupo estas unu el la plej famaj en Ĉinio. Enira bileto kostas 10,00 USD.

5. Ekskursoj

Duontagaj ekskursoj dum la kongreso:

DE1: Pontego Yangpu — Televida Turo "Orienta Perlo" — Pontego Nanpu

Prezo: 20,00 USD

DE2: Ĝardeno Yuyuan — Templo de Jada Budho — Parko Lusin

Prezo: 15,00 USD

DE3: Ĝardeno Yuyuan — Templo de Jada Budho — Malnova Oficejo de la Provizora Korea Registaro en Ŝanhajo

Prezo: 15,00 USD

Antaŭkongresaj ekskursoj:

AE1: Pekino — Xi'an — Ŝanhajo (6 tagoj)

Prezo: 576,00 USD (por loko en dulita ĉambro)
677,00 USD (por unupersona ĉambro)

AE2: Pekino — Qingdao — Ŝanhajo (6 tagoj)

Prezo: 485,00 USD (por loko en dulita ĉambro)
596,00 USD (por unupersona ĉambro)

AE3: Kantono — Guilin — Hangzhou — Ŝanhajo (6 tagoj)

Prezo: 477,00 USD (por loko en dulita ĉambro)
562,00 USD (por unupersona ĉambro)

Postkongresaj ekskursoj:

PE1: Ŝanhajo — Suzhou — Hangzhou — Ŝanhajo (6 tagoj)

Prezo: 255,00 USD (por loko en dulita ĉambro)
345,00 USD (por unupersona ĉambro)

PE2: Ŝanhajo — Xi'an — Pekino (6 tagoj)

Prezo: 576,00 USD (por loko en dulita ĉambro)
677,00 USD (por unupersona ĉambro)

PE3: Ŝanhajo — Hangzhou — Guilin — Kantono (6 tagoj)

Prezo: 534,00 USD (por loko en dulita ĉambro, inkluzive de bileto al Hongkong)

619,00 USD (por unupersona ĉambro, inkluzive de bileto al Hongkong)

PE4: Ŝanhajo — Qingdao — Pekino (6 tagoj)

Prezo: 485,00 USD (por loko en dulita ĉambro)
596,00 USD (por unupersona ĉambro)

PE5: Ŝanhajo — Pekino — Tianjin (6 tagoj)

Prezo: 474,00 USD (por loko en dulita ĉambro)
611,00 USD (por unupersona ĉambro)

Rimarkoj:

1. La kongresa kotizo ne inkluzivas loĝadon, manĝon, transporton, bankedon, ekskursojn kaj aliajn pagendajn aranĝojn.

2. Nepre sendu vian aliĝilon kaj mendilon kune kun pago al la sama instanco (LKK aŭ via landa peranto). LKK ne traktos aliĝilon kaj mendilon sen kompleta pago.

3. Detalaj informoj pri la kongresaj aranĝoj troviĝas en la Dua Bulteno de la kongreso.

Adreso de LKK: 550 Dalian Road (W), CN-200083 Shanghai, China

Tel: +86-21-65423339 Fakso: +86-21-65427900

Kongresaj perantoj: Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo-to 162;

Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. Kesto 4285, Seoul 100-642

ZHU JING:

Grimpado sur Wuling-monton



Sur Wuling-monto

LA montodeklivo pli kaj pli krutiĝis kaj ni grimpis supren en malfacilo. Alia apikaĵo. Apenaŭ ni metis la piedojn sur ĝin, falis ŝtonetoj kaj sabla tero. Por daŭrigi la grimpadon mi permane kaptis ŝultron de mia kungrimanto, sed pro senatenteco li perdis la ekvilibron. Mi rulfalis malsupren kaj svenis de konsterniĝo. Post longe mi rekonsciiĝis kaj trovis min jam kuŝanta sur dika tavolo da falintaj folioj.

Tio ne fremdas por mi. Vojaĝo kun risko estas pli ĉarma, kion mi spertis post mia aliĝo al neprofesia ekspedicio. Antaŭe mia vivovojo estis tre glata. Fininte la lernadon en elementa lernejo, mezlernejo kaj universitato, mi komencis profesian laboron. Al mi mankis ekzercado de la korpo kaj spirito. La urba vivo for de la naturo estas pala kaj eĉ enuiga.

Mi kaj miaj kungrimantoj interkonatiĝis en kurso pri montogrimpado. Ni ofte faris montogrimpadon. Ĉi-foje, profitante de 4-taga libertempo, ni grimpis sur Wuling-monton, la Unuan Monton oriente de Pekino.

Wuling-monto en Xinglong(Ŝinglong)-gubernio de Hebei-provinco estas la ĉefpinto de Yanshan-montaro, kun alto de 2 118 metroj super la marnivelo. Tie ondas montoj, staras diversaj rokoj kaj vivas sovaĝaj bestoj.

Aŭtune en Wuling-monto regas silento. Tie la aero estas freŝa, la pinoj ĉarmaj, la betuloj gigantaj kaj la acer-folioj ruĝaj. Promenante tie, ni sentis nin gajaj. Antaŭ ni iris nia estro kaj ĉiĉerono Xiao Zhu. Li forhakis herbojn kaj arbedojn por faciligi nian iradon. De longe li jam interesiĝis pri montogrimpado. Li tre lertis en la grimpadon kaj ofte faris ĝin en postleciona tempo. Kaj plie, li deziris ekspedicii al la rivero Yarlung Zangbo de Tibeto.

Kiam ni ripozis transgrimante la apikaĵon, iu kungrimanto rompis botelon kun vinbera vino, kies bonodoro tiklis tuj sovaĝajn abelojn, kiuj flugis super ni. Pro timo la junulinoj kriante forkuris, sed la

junuloj restis trankvilaj.

Transirinte montetojn, ni atingis la montosupron ĉe la noktiĝo.

Sur la montosupro ni tranoktis kaj frumatene de la sekva tago ni komencis malsupreniri. Nenian senatentecon ni devis havi pri rojoj kaj ŝtonoj plenaj de muskoj.

Krutaĵo baris al ni la vojon kaj maljunaj pinoj malhelpis al ni la vidadon. Pro tio kelkaj el ni dronis en ĉagreno. Xiao Zhu do ligis sin per unu ekstremo de ŝnuro kaj la alian ĵetis al ni, ke ni kaptu ĝin firme kaj ellasu lin por esplori la aferon. Post momento ni aŭdis frapadon en ia maltrankvilo. Iu junulo, malgraŭ nia deadmono, insistis por sekvi lin. Li fuŝe faris la nodon kaj ĵetis al ni la alian ekstremon de la ŝnuro. Kelkaj junulinoj konkuris por kapti la ŝnuron, sed pro hastemo ili kaptis la ŝnuron de Xiao Zhu anstataŭ tiu de la junulo. Ĉi tiu jam deglitis. Je la momento iu kungrimanto kaptis lian ŝnuron, alie la rezulto estos neimagebla.


Reveninte, Xiao Zhu konigis al ni, ke la krutaĵo altas 30 metrojn kaj sub ĝi troviĝas alia krutaĵo. Vesperiĝis kaj ni do revenis laŭ la jam trairita vojo.

Post plia 2-hora irado mi malrapidigis la paŝojn kaj iris malantaŭ la aliaj. Aŭdiĝis susurado. Venis en mian kapon okazintaĵo, ke sovaĝa besto manĝas homon. Ŝajnis al mi, ke multaj rabobestoj kaŝiĝis ĉirkaŭe. Pro timo mi senprokraste lumigis poŝlampon kaj rapide kuratingis la aliajn. Tion mi diris al Xiao Zhu. Li streĉis la orelojn por aŭskulti. Poste li decideme ordonis, ke ni laŭeble alproksimiĝu unu al alia, estingu poŝlampon kaj ne parolu. Demandite pri la kialo, li diris, ke tio ekzercas la kapablon iri nokte kaj evitigas konfuziĝon pro danĝero. Post tio li diris al mi, ke probable nin sekvis lupoj.

La besto ne kuraĝis nin ataki eble pro nia multopeco. Elvaliĝinte, ni vidis vilaĝon kun lamplumo kaj aŭdis bojadon el ĝi. ■

YANG JING:

Kial ili longe vivas?



104-jara Huang Maqiu

KVANKAM sovaĝeco regas dekel-kajn km. for de la loko, kie la montoj estas verdaj, la riveretoj klaraj kaj la floroj diversaj, tamen, kiam mi atingis ĝin post kelkhora veturado, mi tuj ebriiĝis de la freŝa aero kaj pitoreska pejzaĝo.

Tie estas la Bama-a Jaŭ-nacia Aŭtonoma Gubernio de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono de Ĉinio. La gubernio estas mondfama pro siaj longevivuloj. En Bama vivas 270 pli-ol-90-jaruloj kaj 69 pli-ol-100-jaruloj. La plej aĝa el ili estas 127-jara.

En la gubernio multaj longevivuloj vivas en la vilaĝo Xiucui (Ŝiŭcaj). Tie mi konatiĝis kun 105-jara avino Huang Meibu, kiu sunumis sin en la korto kune kun 7-8 maljunuloj. La avino portis veston el nigra ŝtofo. Ŝi havis rozfreŝajn vangojn kaj brilajn okulojn. Se ŝi ne estus ĝibulo, ŝi ne aspektus kiel grandaĝa maljunulino. Avino Huang konigis al mi, ke en ŝia familio vivas 4 generacioj. Ŝia plej juna pranepo jam atingis la aĝon de 18 jaroj. La edzino de ŝia nepo preparas manĝon por la familio. Ĉiutage ŝi manĝas dufoje, po 2 bovlojn da maizaĝo ĉiufoje.

Vilaĝanoj diris, ke iuj 80-90-jaruloj laboras en la montaro, ne informiĝinte pri nia alveno.

Vidinte mian surpriziĝon, s-ro Chen Jinchao (Ĉen Ĝinĉaŭ), prezidanto de la Bama-a Instituto de Longeviveco, klarigis, ke tio tute ne estas stran-

ga en Bama. Foje li vizitis 117-jaran Wei Buxin (Ŭej Buŝin). Kiam li eniris en la hejmon de Wei, li vidis maljunulon prepari porkonutraĵojn. Li pensis, ke la maljunulo estas Avo Wei. Sed post demando li eksciis, ke la 93-jara maljunulo estas la plej aĝa filo de Avo Wei. Ĝuste tiam Avo Wei hejmenrevenis kun arbobranĉo kiel apogbastono en la maldekstra mano kaj garbo da brulligno sur la dekstra ŝultro. La maljunulo kun 49 gefiloj kaj genepoj diris al s-ro Chen: "Mi ŝatas labori, ĉar tio estas utila por mia sano."

Plejparto de la tieaj pli-ol-100-jaruloj havas bonajn vid- kaj aŭdkapablojn. 41 el ili povas fari simplan mastrumadon. La 107-jara avino Liang Naisong eĉ povas tredi fadenon en kudriltruon.

Kial en tiu loko vivas tiel multaj longevivuloj?

Koncerna materialo montras, ke en Bama (107°E, 23°N) la plej granda monto altas 1 216.3 metrojn super la marnivelo. En ĝi regas subtropika klimato kaj kreskas pli ol 2 000 specoj da vegetaĵoj, kio efikas por purigi la aeron.

En Bama-gubernio fluas Hongshui-rivero, ĉe kies bordoj vivas plejparto da longevivuloj. La tiea aero estas tute ne poluciita. Koncerna departemento montris post esploro, ke en ĉiu kubcentimetro da aero de la loko enteniĝas pli ol 20 miloj da oksigenaj anjonoj, kelkdekoble pli multe ol en ordinara urbo. Evidente, abundo da oksigenaj anjonoj refreŝigaj kaj sanigaj estas unu el la gravaj kialoj de longeviveco de Bama.

La Bama-anoj havas bonan kompleksion. Laŭ enketo pri la sanstato de 120 pli-ol-90-jaruloj oni trovis, ke ili ne estas atakitaj de aliaj malsanoj krom morbilo. 65 pli-ol-100-jaruloj neniam vizitis kuraciston nek prenis medikamenton.

La Bama-anoj manĝas ĉefe maizon. La maizo de tiu ĉi loko entenas pli multe da mangano kaj seleno kaj malpli multe da kupro ol tiu de aliaj lokoj. Ili preferas la manĝaĵon Hŭomajen, similan al sezamgrajno. Laŭdire, tiu manĝaĵo estas riĉa je vitamino E.

Krom la faktoroj de medio kaj manĝaĵo, ankaŭ la socia strukturo kaj geedziĝa moro de Bama-anoj estas esplorindaj. Ekz., tieaj loĝantoj malfrue geedziĝas. Kutime, ili enamiĝas en la aĝo 18-19-jara, geedziĝas en la aĝo 24-25-jara. Estas malpermesite geedziĝi al proksimaj parencoj. De generacio al generacio la Bama-anoj vivas ĉe la bordoj de Hongshui-rivero, ĉirkaŭitaj de montoj. Nun, kvankam etendiĝas tie ŝoseoj, tamen ili ankoraŭ malofte kontaktiĝas kun alilokanoj. Avino Huang Meibu diris, ke ŝi neniam vizitis la gubernian urbon. Por longe vivi eble estas utile eviti diversajn ĝenojn de la socio kaj vivi senzorge. ■

KURANTAJ AFEROJ

EKONOMIO

● La projekto por konduki akvon de sude norden, pripensita multajn jarojn, nun estas en kompleta argumentado.

La projekto estis prezentita pro tio, ke en suda Ĉinio abundas akvo, sed en iuj regionoj de norda Ĉinio mankas akvo. Nun jam planiĝas orienta, meza kaj okcidenta akvokondukaj linioj de la mal-supra, meza kaj supra basenoj de Yangzi-rivero por konduki akvon al Jiangsu (Ĝjangsu)-, Hubei-, Henan- kaj Hebei-provincoj, Pekino, Tianjin kaj nordokcidenta Ĉinio.

● De la 80-aj jaroj la agrikulturaj produktokvantoj de rizo, kotono, porkaĵo, bovaĵo, ŝafaĵo, ovoj, akvoproduktoj, fruktoj, kolzosemoj, legomoj kaj silkraŭpaj kokonoj de Ĉinio saltis al la unua loko de la mondo. Antaŭ 15 jaroj inter la ĉinaj agrikulturaj produktoj nur produktokvanto de tabako okupis la unuan lokon en la mondo.



Hengshui-aj kamparanoj vendantaj grenon al la ŝtato

● Hengshui-subprovinco kun 11 gubernioj kaj urboj de Hebei-provinco estis malriĉa kaj konsumis sume 1.435 miliardojn da kg da greno liverita de aliaj lokoj de Ĉinio en 1953-1981. Dank' al praktiko de novaj terkulturaj rimedoj, t.e. kulturado de greno, kotono kaj fruktarboj ĉiu po 1/3 sur la kampo, la subprovinco akiris riĉan rikolton de greno en la sinsekvaj 8 jaroj. En 1982-1994 ĝi vendis al la ŝtato sume 2.15 miliardojn da kg da greno. En 1994 ĉiu ĝia loĝanto posedis 553 kg da greno.

● S-ino Han Luzhi de Leting-gubernio, Hebei-provinco, kiu vizitis nur elementan lernejon, estas 57-jara kamparanino. En 1991 ŝi informiĝis, ke manĝebla dendrantemo (*dendranthema*) havas grandan debiton en Japanio, ŝi enkondukis 10 tiajn

dendrantemojn el Japanio. Nun ŝi kulturas 300 mil dendrantemojn kun jara produktokvanto de pli ol 10 mil kg, kiuj vendiĝas en Japanio, Sudorienta Azio k.a.

S-ino Han Luzhi aĉetis fotilon kaj videoregistratoron kaj per ili fotis kaj registris la kulturadon. Ŝi disvastigas la teknikon en la loko, kio estas bonvena al la lokaj kamparanoj.



Han Luzhi registranta kreskadon de dendranteoj

● La Aer-kompanio de Hainan-provinco, Ĉinio, ricevis lastatempe sankcion pri grandigo de la akcio por importi de la Usona Aviada Limigita Kompanio kapitalon, kiu konsistigas 25% de ĝia registrita kapitalo. Tiel la kompanio fariĝis la unua aer-kompanio de Ĉinio investita de Ĉinio kaj alia lando kune.

● La Ekonomia Grupo Land, privata entrepreno de Ĉinio, sukcese lanĉis sputnikon la 17-an de novembro, 1995 en la Kazahstana Respubliko.

Oni raportis, ke pluraj satelitaj kaj televiziaj kompanioj jam peticiis lui la sputnikon. Iuj kompanioj kaj bankoj de Ĉinio liveris financan servon por fabriki, lanĉi kaj luigi la sputnikon.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Bifidbacilo Taikong, kiu havas grandajn scienc-teknikan kaj aplikan valorojn, estis sukcese kulturita en Ĉinio.

Bifidbacilo estas tre grava fiziologia bakteria kolonio en la homa korpo. Ĝia kvanto, kiel unu el la gravaj normoj por la homa sano, rekte influas la fizio-biokemian kaj imunologian parametrojn de la homoj. La sukceso estis atingita de la Biologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu portigis bonspeciajn bifidbacilojn, kulturitajn de la Pekina Bioteknika Kompanio Xindadi, en la reprenan scienc-eksperimentan sateliton por fari aktivan kaj pasivan eksperimentojn, kaj oni ricevis bonrasajn heterogajn bifidbacilojn post traktado de la bifidbaciloj en la spaco.

Oni informis, ke la kompanio Xindadi sola aranĝos produktadon de tiu bifidbacilo.

- La mistero pri la formiĝo de la Leŭsa Altebenaĵo kun areo de 400 000 kvadrataj kilometroj estas pluapŝe malkovrita de ĉinaj sciencistoj.

Ili opinias, ke la leŭso formiĝis iom post iom en la pasintaj 2.5 milionoj da jaroj. Polva ŝtormo de okcidente kaj humida aero de oriente tie renkontiĝis kaj la miksiĝinta ŝlimaĵo falis teren. Dum interglacia epoko sur la altebenaĵo kreskis ĉefe herboj kaj arbedo, kaj arbaro en rivervalo kaj rokeca loko. Tio prezentis scienca bazon por esplorado pri la flaŭro sur la Leŭsa Altebenaĵo.

- Tritika flav-nanismo kaŭzita de hordea flav-nanisma viruso, kiel la plej damaĝa virusmalsano, vidiĝas en multaj lokoj en kaj ekster Ĉinio. Ĝi multe damaĝas la rikolton. Antaŭ nelonge la Vegetaĵ-protektita Instituto sub la Ĉina Agronomia Akademio sukcese kulturis transgenan tritikon anti-flav-nanisman. Dank' al tio la problemo de flav-nanismo longe minacanta la tritikan produktadon espereble solviĝos.

KULTURO

- “Plena Kolekto de Puŝkin” el 3 milionoj da ideogramoj, kiu ampleksas ĉiujn poemojn, novelojn, dramojn, artikolojn pri politiko kaj literaturo, taglibrojn, biografion kaj leterojn de Puŝkin, granda rusa verkisto, estis eldonita en la ĉina lingvo de la Zhejiang(Ĝeĝjang)-a Eldonejo de Literaturo kaj Arto, Ĉinio.

- Ĝis decembro de la pasinta jaro 250 000 ĉinoj lernis en 103 landoj kaj regionoj.

En la lastaj jaroj la nombro de la ĉinoj, kiuj, fininte sian lernadon eksterlande, revenis al Ĉinio, kreskis po 13% ĉiujare. La ĉinoj vivantaj eksterlande servas al sia patrolando per prelego en Ĉinio, scienc-esplora kunlaboro, teknika eksperimento, ekspluato de novaj produktoj, esploro pri renovigo de produktoj, enkonduko de kapitalo kaj tekniko-transigo. Sole en Ŝanhajo estas ĉ. 280 entreprenoj fonditaj de la ĉinoj studintaj eksterlande.

ARKEOLOGIO

- La Arkeologia Instituto de Antikvaĵoj de Jilin(Ĝjilin)-provinco en nordorienta Ĉinio lastatempe malkovris silkan pentraĵon de pli ol mil jaroj en antikva tombo oriente de la urbo Jilin.

La antaŭe elfositaj silkaj pentraĵoj temas ĉefe pri homfiguroj, geografia karto kaj mito, sed sur tiu ĉi legiĝas enigmaj signoj. La pentraĵo kun lertaj strekoj, unuformaj linioj kaj forta ornameco havas gravan

signifon por esplori arkeologion, la evoluan historion de antikva belarto, antikvan sepultadon, folkloron kaj aliajn kampojn.


MEDICINO

- De decembro de 1993 Ĉinio prenigis al ĉ. 80 milionoj da infanoj de malpli ol 4 jaroj plian vakcinon kontraŭ poliomiĵelito. Ĝis la fino de septembro 1995 en Ĉinio okazis neniun kazo de poliomiĵelita viruso en la sinsekvaj 12 monatoj.

TURISMO

- En 1995 la turisma vidindejo Qiandao(Ĉjandaŭ)-lago en Zhejiang-provinco, Ĉinio, akceptis 1.45 milionojn da turistoj.

Qiandao-lago, kiel unu el la plej grandaj ŝtataj arbaraj parkoj de Ĉinio, kovras areon de 773 kvadrataj kilometroj. En la lago kuŝas 1 078 ĉarmaj insuloj grandaj kaj malgrandaj. En la lastaj jaroj tie fondiĝis satelita telekomunika reto kaj surakva savcentro, kio multe plibonigis la turisman, trafikan kaj publik-sekurecan ordon de la loko.



Ĉe Qiandao-lago

- Antaŭ la pordoj de la Halo de Trezoroj kaj Halo de Horloĝoj en la Muzeo de la Imperiestra Palaco de Pekino okulfrapas averta tabulo kun la vortoj: Antaŭ enhaliĝo bonvolu surmeti la “antikvaj-protektajn ŝuojn” por gardi la “orajn brikojn”.

Fakte, la tiel nomataj oraj brikoj ne estas faritaj el oro, sed el delikata sablo transportita el Suzhou. La sablo, prilaborita per pli ol 20 kompleksaj teknologioj, estis bakita en orbrilajn brikojn por pavimi plankon. Tiuj solidaj, daŭremaj kaj multvaloraj “oraj brikoj” estas protektendaj, ĉar la teknologioj por fari ilin perdiĝis kaj restas nur malgranda kvanto da tiaj brikoj.

Masaĝo en la ĉiutaga vivo (X)

KONTRAŬ TORTIKOLO

Tortikolo okazas ĝenerale matene pro febliĝo aŭ trolaciĝo. Se oni tenas sian kapon sur kapkuseno tro alta aŭ tro malalta en dormado, se oni tenas sian kapon longe oblikvanta al la korpo, se la nuko estas atakata de vento kaj malvarmo, do oni povas suferi de tortikolo.

La tortikoluloj sentas doloron flanke de la kolo post ellitiĝo. Por ili estas malfacile aŭ dolore levi sian kapon kaj klini ĝin dekstren kaj maldekstren. Por rigardi malantaŭen ili devas turni sin. La trapezo (Bildo 1) kaj sternokleidomastoido (Bildo 2) estas streĉitaj, rigidaj kaj doloraj ĉe la premo.

MASAĜO

(1) La malsanulo kuŝu surventre ĉe lito kaj vi,

masaĝanto, per la pinto de viaj dikfingroj premnedu la akupunkturajn punktojn *fujang* kaj *ŝĵuanĝong* ambaŭflanke de la piedoj de la malsanulo po unu minuton (Bildo 3). Dum la masaĝo la malsanulo turnu sian kapon kaj rigardu dekstren kaj maldekstren. Post momento la malsanulo turnu la kapon en pli granda amplekso.

(2) Per la pinto de viaj dikfingroj premu la akupunkturajn punktojn *kunlun* de la piedoj (Bildo 3). Dum la premado la malsanulo levu kaj mallevu la kapon po unu minuton. Post tio la doloro povas mildiĝi.


(3) La malsanulo sidu kaj vi, masaĝanto, per la dikaj kaj montraj fingroj frotu, knedu kaj pinĉu la trapezon kaj sternokleidomastoidon 3 minutojn ĝis ilia ruĝiĝo (Bildo 4).

(4) Premu, knedu kaj pinĉu la akupunkturajn punktojn *fengĉi*, *tjanĝu*, *daĝuj* kaj *ĝjanĝing* po duonminuton (Bildo 5).

(5) Per la pinto de viaj montraj fingroj premu la akupunkturajn punktojn *ĉĵuepen* ambaŭflanke de la kolo de la malsanulo duonminuton (Bildo 6).

(6) Per la pinto de via dekstra dikfingro piku la akupunkturajn punkton *ĉengĝjang* 10 sekundojn (Bildo 6).

La masaĝo povas mildigi la suferon. ■



Humuro de Afanti

de WU ZEIQING

Englutu vivan katon

*Afanti kuracistis tre originale:
senmonajn kiel riĉajn traktis li egale.
Pro tio bienulo de l' vilaĝo
indignon sentis tutagale.
Venigis li al si Afanti ĉikancele
kaj diris al li, ke firato rampis ŝtele
tra lia buŝo en lian stomakon,
dum nokte sonĝis li miele.
"Ho, kion fari? Helpu jam doktoro!"
Li veis kvazaŭ vere en doloro.
Aŭdinte lin, Afanti vidis,
ke sin ŝajnigas la sinjoro.
Ŝajnigis li vizaĝe tuj kompaton:
"Ekstermi l' enstomakan raton
ja estas simpla bagatelo:
Bonvole tuj englutu vivan katon!"*

Deziroj viaj koincidas

*Sur voj' sinjoro riĉa iras
kaj al Afanti jenon diras:
"Ho, kara, vi kaj la azeno
amikojn bonajn tre similas.
La intimecon mi admiras!
Vi kien rajdas sur l' azeno?"
Afanti nuas kaj suspiras:
"Al la celloko jam alveno!
L' azen' enuas en la domo,
malŝatas la solec-estadon,
parolis al mi pri bezono
revidi la pli aĝan fraton.
Foresto via ĝin ĉagrenas.*



*Jen ankaŭ vi ĉi lokon venas.
Kvankam distanco vin dividas,
deziroj viaj koincidas."*

Vizaĝo monstra

*La brovojn Lia Reĝa Moŝto' kuntiras,
kaj al gardist' Afanti jenon diras:
"Hieraŭ klare mi min vidis en spegulo,
kaj ege min ja naŭzis la figuro.
Memoru jam, Afanti, de ĉi tago,
speguloj estu for de miaj okuloj!"
"Ho, jes, Via Majesto!"
respondis la gardisto tute sen kontesto:
"Se unu sola vido de l' vizaĝo
jam ĝenis vin per tia malplaĉo,
kiel do povus mi elteni,
ke ĉiutage pli ol dekfoje al vi veni!
Se honestule mi parolas,
de longe vidi l' monstron mi ne volas."*


Vere restas jam nenio

*La reĝ' kaj ĉefministr' el ĉas' revenas
kaj soifegas pro penad' kaj ŝvitoplenas.
Preterpasante l' domon de Afanti
de sur ĉevaloj ili krii penas:
"Ho, civitanoj, tuj jahurton al ni portu,
aldonu friskan akvon, ke ni ne soife mortu!"
Aŭdinte tion, jen Afanti el la domo venas,
al ili riverencas kaj respondas per ĉi vortoj:
"Sinjoroj! Da jahurto restas jam neniom;
tre bedaŭrinde, mi eltrinkis ĉiom!"
La reĝ' kaj ĉefministro falis en malĝojon
kaj kun klinita kapo ili iris plue vojon.*

*En malproksimo l' reĝo kaj l' kompano
returnas sian kapon — krion ili aŭdas:
Afanti sur tegment' kun poto en la mano
kriegas energie, lia voĉo laŭtas:
"Revenu! Tuj revenu Viaj Moŝtoj al mi!
Mi havas ja ankoraŭ por vi vorton!"
La reĝo kaj la ĉefministro do reiras al li.
Afanti tuj renversas, levas alte l' poton:
"Mi tre bedaŭras! Restas jam nenio!
Rigardu propraokule, Viaj Moŝtoj,
ja pura vero estas tio!"*

Esperantigis Laŭlum

Noto: Afanti estas "monda figuro" en folkloro. Turkoj asertas post esploro, ke li estis turko vivinta en la periodo 1208-1285 p.K. Muzeo de Istanbulo konservas pentraĵon pri Afanti. Li havas longan blankan barbon kaj grandan turbanon kaj rajdas sur magra azeneto. Rakontoj pri Afanti de longe cirkulas en la ĉina regiono Xinjiang. Ili prikantas la diligenton, bravecon, saĝecon kaj optimismon de la laboruloj kaj malkaŝas kaj mokas la avidemon, avarecon, stultecon kaj kruelecon de la feŭdaj regantoj.



**Nova libro eldonita de la Ĉina
Esperanto-Eldonejo**

Ruĝdoma Songô

(Volumo I)

“Ruĝdoma Songô” estas unu el la plej famaj klasikaj romanoj de Ĉinio, kiu priskribas la ruiniĝon de iu nobela familio en la lasta periodo de la ĉina feŭda socio kaj la tragedion de juna amanta paro. La romano prezentas la dekadencan de la ĉina feŭda socio kaj ĝiajn diversajn konfliktojn.

La romano estas vaste konata en Ĉinio, kiel verkoj de L. Tolstoj en Rusio kaj la dramoj de Ŝekspiro en Britio. La Esperanta versio de “Ruĝdoma Songô” estas en tri volumoj, inter kiuj la dua kaj tria estos eldonitaj respektive en 1996 kaj 1997.

Formato: 14 x 22 cm. (bind.) 582 pĝ. kun 72 nigraj ilustraĵoj

Prezo: 26.00 USD

Mendu ĉe: Distribua Fakoj de EPĈ

Libroservo de UEA

Nia peranto en via lando

GALERIO

Kantado kun piedbato

de RUAN HAIYING

La pejzaĝa pentraĵo farita de Ma Yuan, pentristo de la Norda Song-dinastio (960-1127), sur silko, estas longa je 191.8 cm kaj larĝa je 104.5 cm.

Sur tiu tuĉpentraĵo vidiĝas, ke en bela kvietaj valo iras ebriaj kamparanoj junaj kaj maljunaj kun piedbatado. Kantado kun piedbato estis amuzajo en la antikva Ĉinio.

La homfiguroj sur la pentraĵo estas tute harmoniaj kun la pejzaĝo. La aŭtoro dediĉis grandan parton al la bela pejzaĝo kaj prezentis homojn per simplaj strekoj: Maljunulo kun griza barbo iras antaŭe kun bastono en mano. Li, rigardante malantaŭen, eĥas la sekvantan kamparanon. Sur la pentraĵo krutas montoj kaj prosperas arboj. Ĉio elspiras vigecon, pacon kaj ĝojon. La aŭtoro bildigis altan montpinton, rektajn arbojn kaj zigzagan vojeton en harmonia tuto.

伯雨清畿甸


初陽麗帝城

宣年人樂業

瓏上踏歌行

蘇工部畫景





Tianchi-lago en Xinjiang

Foto de WANG XINMING

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九六年第四期

(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2